

# ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Abraham:  
Vojdifina  
vortaro araba**

**Ĉu indiĝenoj  
dialogos  
en Hago?**

**Japanio:  
Ekpensi loke,  
agi mondscale**



## La horo de tutmondiĝo



# Vi trovos...

## Seula seminario

LEE Chongsae

### 29 Aplikado

#### Kolokva tradicio revekita en Prago

Laŭ Miroslav Malovec kaj Petro Chrdle

### 30 REAGJOJ

### 32 RECENZOJ

#### Higinio García pri Antologio latina

#### Hugh Martin pri Klara vortaro Esperanta-araba

#### Miko Sloper pri La sankta instruo de ŝonbulismo

#### Trevor Steele pri Ili vivis sur la tero

#### Detlev Blanke pri Nikola Aleksiev: Biobibliografio

### 35 LASTE APERIS



Komplazo de G. Abramam

## Kaj plue...

### 36 Loke

### 37 Fake Deklaracio pri etnista humanismo

### 38 Persone Oficiala Informilo

### 39 Anoncetoj

### 40 Forpasoj

**La kovrilo:** En 1999 la mondo rigardas sin en horloĝo. (F. L. Veuthey)

**Dekstra paĝo:** Sidangulo en la ĝardeno. (Instituto Narwal, Wassenaar, Nederlando)

### 21 Malferme Solidarece

GBEGLO Koffi

### 22 TUTMONDIĜO: ŜANCOJ POR PACO?

Vilmos Benczik

“La homaro  
nuntempe aliras  
siajn problemojn  
multe pli konscie  
kaj racie ol ĝi  
faris iam ajn.”



Francjo Veuthey

### 24 Instruado

#### Doni parolon al senvoĉuloj

Intervjuo kun Sylvain Lelarge

### 26 UEA EKUZAS EŬRON



### 27 Translima kunlaboro



#### Infandesegnaĵoj ligas interkulture

Katalin Smidélusz

#### Infanoj pri la milito

Petro Levi

### 28 NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ



#### Lingvaj rajtoj

#### Loka ek', monda eĥ'

YAMASAKI Seikô

## ESPERANTO

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio  
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.  
Grafiko: Francisco L. Veuthey.  
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.  
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.  
Legata en 115 landoj.  
Voĉlegata por vidhandikapitoj.  
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.  
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.  
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.  
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).  
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:  
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.  
Telefono: +31-10-436-1044.  
Telefakso: +31-10-436-1751.  
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.  
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.  
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.  
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.



## SOLIDARECE

“Mi tuj vojaĝos eksterlanden. Tie mi ŝatus kontakti geesperantistojn. Ĉu vi havas adresojn de iuj eksterlandaj samideanoj?” Tiel parolis iam al mi samlandano, studento, novbakita esperantisto. Mi prenis mian Jarlibron, kaj li petis enrigardi. “Kie kaj por kiom vi aĉetis ĝin?” Mia respondo estis: “Mi ne aĉetis ĝin, sed UEA sendis ĝin al mi, ĉar mi estas ĝia membro. Vi ne rajtas havi ĝin, ĉar vi ne jam estas membro de UEA. Mi povas kontakti samideanojn de la landoj kiujn vi vizitos, kaj demandi ĉu ili povas konatiĝi kun vi. Ne nur la Jarlibron la membreco de UEA donas, sed ankaŭ periodaĵojn kiuj informas pri la movado tutmonda.” Li tuj demandis pri la membriĝo al UEA. Kiam mi montris al li la koston, li reagis: “Ĉu tiom grandan sumon vi pagis? Vi scias ke mi estas studento kaj al mi mankas monrimedoj. Mi do ne povas membriĝi al UEA, ĉu ne?” Diveneblas mia tiama respondo: “UEA helpas al multaj esperantistoj fariĝi membroj en ĝi.”

Multaj tra la mondo scipovas Esperanton, sed al ili mankas informoj pri la movado, la organiza vivo, la farto de Esperanto en multaj landoj. La eldonaĵoj de UEA liveras tiajn informojn. Ĉiuj esperantistoj do bezonas tiujn servojn de UEA, kaj tiu ĉi ne povas senpage distribui siajn periodaĵojn. Tial malavaraj gesamideanoj membrigas siajn amikojn al UEA, kaj aliaj sendas, post legado, siajn periodaĵojn al nepagipovaj

gesamideanoj. La avantaĝo de membreco en UEA koncernas ne nur havon de informiloj/periodaĵoj, sed per ĝi oni povas ankaŭ rilati kun aliaj membroj tra la mondo. Estas do necese ke kiom eble plej multaj samideanoj membriĝu al UEA. Tial en 1960 naskiĝis Fondaĵo Canuto, memore al la tiujare forpasinta prezidanto de UEA, por helpi al membriĝo de nepagipovuloj. Malavaraj esperantistoj donacas monon al la fondaĵo. Tiu mono estas uzata por membriĝi nepagipovulojn al UEA. Ofte la fondaĵo elspezas pli da mono ol ĝi kolektas. Ĝi tiukaze estas devigata, por plu helpi al nepagipovuloj, peti subvencion de aliaj fondaĵoj: Propaganda Konto, Fondaĵo Afriko, Fondaĵo Ameriko, Fondaĵo Azio ktp. En 1997 entute 895 personoj ĝuis la membrigon pere de Fondaĵo Canuto: 391 el Orienta Eŭropo kaj eksa Sovetio, 277 el Azio, 130 el Afriko, 96 el Latin-Ameriko, kaj 1 el Oceanio.

Kreskas la nombro de esperantistoj triamondaj, el kiuj kiom eble plej multajn UEA “kanutigu”, por ke ankaŭ ili integriĝu en nian movadon. Nenur la membriĝo gravas: ni zorgu ankaŭ pri la farto kaj disvastigo de Esperanto tutmonde. Tial niaj kontribuoj koncernu ĉiujn fondaĵojn kiujn UEA starigis tiucele. Nia solidareco al niaj gesamideanoj triamondaj signifas strebadon al homogenigo de la tutmonda Esperanto-movado.

GBEGLO Koffi





# Tutmondiĝo: ŝancoj por paco?

Vilmos Benczik - Hungario

**Kion signifas "tutmondiĝo" por esperantistoj? Pens-instigas la kunordiganto de la kongresa temo.**



**T**utmondiĝo komenciĝis ne hieraŭ. En iu senco ĝi startis jam fine de la 15-a, komence de la 16-a jarcento kun la geografiaj malkovroj de Magelano kaj Vasko da Gama, ja tiuj eventoj kreis la bazon por tio kion nuntempe ni nomas monda komerco.

Revolucie rapidigis tiun procezon la telegrafio de Morse meze de la 19-a jarcento, la telefonio kelkajn jardekojn poste, la radiofonio ekde la dudekaj jaroj de nia jarcento, poste la televido, kaj la Tut-Tera Teksaĵo dum la lasta jardeko. Marshall McLuhan en 1962 jam prave parolis pri *tutgloba vilaĝo*, tamen la verecon de lia eldiro nur nuntempe ni funde komprenas.

La unua frazo kiun Morse en 1844 transsendis per sia aparato, estis la jena: *What hath God wrought?* — Kion Dio estas farinta? La tekstoelekto de Morse povas esti rigardata kvazaŭ simbola, ja ĝis nun ni ne scias la respondon. Kion vere faris Dio, donacante ilojn al la homoj por krei tutmondiĝon? Ĉu bonon, aŭ malbonon?

## Ideala grundo

El la vidpunkto de tiel esence internacia grupo da homoj kia estas la Esperanto-movado, je la unua aliro al la demando la respondo ŝajnas esti klara. Ja la tutmondiĝaj procezoj donas vere idealan grundon por tio ke ĉiam pli da homoj rekonu: "*Kristanoj, hebreoj kaj mahometanoj / Ni ĉiuj de Di' estas filoj.*" La neniam antaŭe imagita eblo

por la senpera kontakto de individuoj, loĝantaj en la plej disaj anguloj de la terglobo, certe povas akceli interkompreniĝon, kaj per tio eliminon de suspektoj, misimagoj, malamikaj sentoj, kiuj dum jarmiloj servis kiel fekunda grundo por militoj.

Tutmondiĝo signifas malpliigas la gravecon de la naciaj ŝtatoj, kiuj dum la lastaj jarcentoj servis kiel ĉefa kadro de la homa vivado. Ni spertis kaj multloke spertas ankoraŭ ke tiuj ŝtatoj — ofte tute senmotive — signifas limigas la bazajn rajtojn de la individuoj. La evoluo de la komunikadaj teknikoj efike bremsas kaj ĉiam pli malebligas tiujn strebojn de la ŝtatoj. El la tri dimensioj de la homa vivo — loka, ŝtata, tutgloba — la pezo de la ŝtata dimensio kontinue ŝrumpas, kaj kreiĝas interesa sintezo de la loka kaj tutgloba dimensioj. Tio evidente influas favore la homajn kontaktojn, eliminis multe da pli fruaj kontraŭdiroj, antagonismoj — efektivaj aŭ nur imagitaj, ŝajnaj. Tamen samtempe ĝi lanĉas ankaŭ multajn novajn kontraŭdirojn, antagonismojn — ofte tre efektivajn.

## Kulturaj perdoj — kaj ebloj

Unu el tiuj kontraŭdiroj aperas sur la tereno de kulturo. Kulturoj ja origine estis lokaj, kaj nur dum la lastaj jarcentoj tiuj lokaj kulturoj — ne ĉie kaj ne plene! — kunfandiĝis je naciaj kulturoj. Tiu procezo rezultigis la malaperon de aro da nuancoj, koloroj; nekontesteble la homaro perdis multon per ĝi. Nun la tutmondiĝo minacas kunfandi tiujn





**Roterdama ĉefstrato: foje harmonie, foje konflikte intermiksiĝas lokaj tradicioj kaj influoj venantaj de landoj plej diversaj.**

partoprenus en ĝi kun ega superpezo la kulturo de la ekonomie kaj politike potencaj nacioj. Aliflanke estas nekontesteble ke la tutmondiĝo — ekzemple la Tut-Tera Teksaĵo — principe ofertas ĝis nun neimagitajn eblojn al la malgrandaj kulturoj; tamen tiuj ebloj nuntempe ŝajnas esti plie nur principaj ol efektivaj.

La alia grupo de novaj kontraŭdiroj aperas sur ekonomia kaj financa tereno — tiom pli ke ekonomio ludas jam de jarcentoj sendube pioniran rolon en la tutmondiĝa procezo. La radiko de la kontraŭdiroj ĉi-kampe estas la praktike absoluta movlibero de la kapitalo. La du ĉefaj celoj de la kapitalo ĉiam estis trovi malkaran — tamen necese instruitan — laborforton kaj minimumajn impostojn. Nuntempe praktike nenio malhelpas al ĝi atingi tiujn celojn, kaj tiu cirkonstanco — tre paradokse — kaŝas en si seriozajn minacojn ĝuste por tiuj pli riĉaj landoj kiuj klopodis pleje obei al la baza principo de la homa (fakte pli precize nur: civitana) solidareco. Nome: el tiuj landoj fuĝas la kapitalo, al mondopartoj kun malpli altaj kostoj de laborforto, kio rezultigas perdon de laborlokoj kaj drastan ŝrumpo de impostaj enspezoj. (Por ke la situacio estu pli komplika, la spertata drama procezo parte promesas disvolviĝon de ia internacia, t.e. homar-dimensia solidareco.) Tiu situacio povas krei — kaj multloke fakte jam krei — tiel fortan antagonismon inter diversaj grupoj de homoj ke ĝia akreco ne postrestas al tiu de la antagonismoj konitaj dum la lastaj jarcentoj.

Avantaĝo de la nuna situacio kompare al la pli fruaj tempoj estas tio ke la homaro nuntempe aliras siajn problemojn multe pli konscie kaj racie ol ĝi faris iam ajn pli frue. Al tiu racia kaj konscia aliro povas nun kontribui ankaŭ ni, esperantistoj, debatante la problemon en nia ĉi-jara Universala Kongreso. ★

lokajn-naciajn kulturojn je unueca internacia kulturo. Tio neeviteble rezultigus pliajn perdojn, kaj tion la plimulto de la homoj nuntempe ne volas akcepti; tiom pli ke la kunfandiĝo prognoziĝas esti tute ne demokratia, sed

## Tutmondaj kultur-retoj


Forpasis la tagoj kiam debatojn pri kulturpolitiko limis naciaj horizontoj. Antaŭ ne pli ol 20 jaroj baza dilemo por ĉiu lando estis difini kiugrade ĝi akceptu importitajn produktojn kaj mesaĝojn, kiom ĝi instigu interfluan kun la internaciaj tendencoj de arto kaj pensado, kaj kiom ĝi protektu kaj kuraĝigu la propralandan kreemon. En Afriko, Azio kaj Latin-Ameriko iuj artistoj elektis integri la novigajojn de la internacia avangardo en sian lokan kulturon, dum aliaj vidis neceson starigi simbolajn doganlimojn por bremsi la "invadon" de fremdaj kulturoj. Kvankam ĉi tiuj alternativoj ne tute perdis sian aktualon, ili nuntempe estas multe malpli realigeblaj pro la teknologiaj, ekonomiaj kaj simbolaj ŝanĝoj en la strukturo de la kultura merkato. La procezo de tutmondiĝo — pli kaj pli intima interfiko de diversaj ekonomiaj agadoj kaj kulturoj, kiun estigas sistemo mult-centra — influas ĉiujn kampojn de la kultura evoluo.

Ĉiam pli ampleksa parto de la kultura produktado okazas en industriaj dimensioj kaj cirkulas en translimaj komunikretoj. Ekzemple, la art-merkato funkcias ne plu kiel aro de apudmetitaj naciaj merkatoj, sed kun propra mond vasta strukturo, kiun kreas reto de galerioj, muzeoj kaj eldonistoj funkciantaj je tutmonda skalo.

Néstor García Canclini, Aŭtonoma Metropola Universitato de Meksiko (El "Kulturo: Pensi por tutmonda epoko", en UNESCO Sources, jul.-aŭg. 1998, trad. István Ertl)

## Kreskado de kultura komerco

La monda komerco de kulturaj varoj\* kreskis de \$67 miliardoj en 1980 ĝis \$196,5 miliardoj en 1991.



\*Presaĵoj, literaturo, muziko, vidaj artoj, kino, fotografio, radio kaj televido. Fonto: World Culture Report \*\*Malneta Nacia Produkto



**Kvankam franco, vi ne bezonis longan tempon por vojaĝi al Roterdamo.**

Kun mia nederlanda edzino kaj direktorino, Bessie Schadee, ni funkciigas la Lerno-kaj Lingvoinstituton Narwal en Wassenaar apud Hago. Ni havas jam grandan sperton en la kampo de efika kaj rapida instruado.

**Vi du iniciatis tre ambician projekton.**

En ĝia informa broŝuro vi skribas: "en 2004, la indiĝenaj popoloj povus esti formintaj solidan reton de proksimume 200 organizoj flue komunikantaj inter si..."

... kaj "kreintaj Indiĝenan UN, kiu akceptigus kaj respektigus la rajtojn de la indiĝenaj popoloj de la mondo"!

**Do, jen projekto kun tre larĝa perspektivo. Kiel ĝi ekvojis?**

Okazis ke pasintan majon restadis en Nederlando — interalie ĉe nia instituto — José Carlos Morales, kostarika indiano el la etno brunka, kiu reprezentis de 1995 ĝis pasintjare la indiĝenajn popolojn ĉe UN. Li estas, cetere, la unua el sia popolo kiu faris studojn kaj revenadis al sia naskiĝ-regiono por transdoni siajn sciojn. Dum paroloj kun li, ekkreskis la ideo ke utilis kombini Esperanton kaj la sperton de Narwal pri rapida lernado kun liaj konoj kaj reto de indiĝenaj ĉefoj: povus rezulti unika E-kurso kun imponaj rezultoj.

Eblajn interesatojn mi varbis en oktobro, en tutmonda konferenco de indiĝenaj popoloj en Usono. Tie, cetere, klare videblis la obstakloj al tutmonda indiĝena interkontaktado: ĉeestis preskaŭ nur amerik-

Bessie Schadee



Sylvain Lelarge




anoj, kaj 28 ne-angleparolantaj partoprenuloj forestis pro nericevo de vizo.

**Oni do bone akceptis la ideon de "Indiĝenaj Dialogoj", ĉar ĝi respondas al reala bezono.**

Fariĝas ĝenerala nun la konscio pri la utileco de la scioj kiujn akumulis la indiĝenaj popoloj. Tamen, tiun konscion devas akompani respekto al ili, kaj tian respekton ili atingos nur havante komunikreton. Kelkaj el ili vidas tiun neceson, aliaj ne, aŭ ne kredas ke ekzistas solvo; triaj estas tro minacataj en sia loka agado por agi kaj pensi je pli larĝa skalo.

# Doni parolon



Corel Photos. Ĉiuj ceteraj fotoj: Instituto Narwal

La dua prepara paŝo estis, je la jarŝanĝo, kuna semajno ĉe Narwal por la estontaj instruistoj: Katalin Smidélus, Atilio Orellana Rojas kaj Sabine Trenner. En la unua

semajno instruos Smidélus kaj Orellana laŭ siaj metodoj; en la dua mi, laŭ mia tekniko.

Kaj nun ni atendas, por la tria semajno de aprilo, la alvenon de 8-12 partoprenantoj. Narwal estos

ĝusta loko por ili, ĉar tie la naturo troviĝas apude. Indiĝenoj bezonas senti sin bonvenigataj ne nur de la homoj, sed ankaŭ de la naturo. Ĉe Narwal povos okazi la necesaj ritoj, bonvenigo ĉe kulta fajro.

**Laŭ viaj planoj, la nuna fazo de la projekto koston ĉ. 130 mil eŭrojn, el kiuj Narwal certigos 20%. Ĉu vi sukcesas trovi mecenatojn por la ceteraj 80%?**



Idealaj lokaloj por etaj lerno-rondoj

Instituto Narwal





# al senvoĉuloj

Dum la "jardeko de indiĝenaj popoloj" de UN (1995-2004), ĉu tiuj ĉi sukcesoj krei por si egalecan interkomunikon reton vere internacian? Unuan paŝon al tiu ambicia celo povus signifi la projekto "Indiĝenaj Dialogoj", lanĉita de Bessie Schadee kaj Sylvain Lelarge. Ni intervjuis ĉi lastan.

Egaleca komunikreto helpu modifi kliŝajn imagbildojn pri indiĝenoj.

La projekto Indiĝenaj Dialogoj celas doni al indiĝenaj organizoj rimedojn por libere kaj senpere kunlabori. Kombinante Esperanton kun modernaj instru- kaj komunik-teknikoj eblas rapida kaj daŭra sukceso.

En majo centjariga festo-evento de la unua Monda Konferenco por la Paco okazos en Hago. Ĉeestos ĉ. 30 reprezentantoj de indiĝenaj popoloj. Kelkaj el ili kune pasigos la tri antaŭajn semajnojn lernante paroli kaj skribi E-on, utiligi retpoŝton por resti en kontakto kaj inici siajn hejmanojn al ambaŭ kapabloj.

Jes, iom post iom, ĉar konvinkas ilin la boneco de la ideo mem, la prestiĝo de Narwal kaj de la partnera Nederlanda Centro de Indiĝenaj Popoloj.

### ■ Kiel disvolviĝos la dua fazo de ID?

La lernintoj, tuj kiam kapablaj interkomuniki, evoluigos sian propran reton. Ni klopodos altiri la atenton de amasinformiloj, kaj ni raportos pri la rezultoj en ĉiuj indiĝen-rilataj kongresoj.

## Indiĝenaj dialogoj

Interesiĝas partopreni anoj de la popoloj tlingita (Alasko), japuka (Siberio), brunka (Kostariko), mapuĉa (Patagonio) kaj majaa (Meksiko, Gvatemalo).

La projekton subtenas UEA, Lerno-kaj Lingvoinstituto Narwal, Nederlanda Centro por Indiĝenaj Popoloj, Instituto por Tutmondeca Eduko (Richard Schneider), Universitato de Amsterdamo, la bankoj ASN kaj Triodos, k.a.

Informas: S. Lelarge kaj B. Schadee, Narwal, Oud Clingendaal 7, NL-2245 CH, Wassenaar, Nederlando; ☎ +31/70/517-75-23, ✉ 517-66-82; □ narwal@usa.net

### ■ Do, ĉu en 2004 Indiĝenaj Unuiĝintaj Nacioj parolos Esperanton?

Kun bonŝanco, jes, kvankam la tempo foje havas siajn proprajn vojojn. Nia eksperimento pruvos ke E-o plus interreto donas efikan respondon al la problemoj de tutmondaj komunik-retoj kiujn ne kontentigas uzo de la angla aŭ de alia "granda" lingvoj: de terkulturistoj, virinoj, ĉiaj fakuloj ne lingvemaj. "Indiĝenaj Dialogoj" servu kiel prototipo por aliaj retoj. ★



# NOVA TELEVID-SERIA KURSO

VERKITA DE PAUL GUBBINS  
KUN JUNAJ TALENTAJ  
ESPERANTISTOJ EN LA ROLOJ

POR INSTRUI  
ESPERANTON

### Esperanto – pasporto al la tuta mondo

konsistos el 15 lecionoj (po 30 minutoj) kaj akompana presita materialo, celantaj individuon aŭ grupon studadon. La distra historio konstruita sur didaktika bazo faciligas kaj ĝojigas la lernadon. Ĉiu leciono okazas plene en Esperanto kaj enhavas tri partojn: enkondukon, intrigon kaj resumon.

La kontinueco de la aventuroj de familio Bonvolo, la televidseria karaktero, kaj la vigla kaj sprita dialogo tenas la atenton de lernantoj – kaj eĉ de pli spertaj parolantoj de nia lingvo!



La resumo detale traktas la ĉefajn gramatikajn erojn prezentitajn en ĉiu ĉapitro. Skrib-ekzercoj, verkitaj de Stefan McGill, kompletigas la lecionojn.

La unuaj kvar lecionoj jam aperis kaj estas vaste laŭdataj. Prezo: € 78,95. La sekvaj ses lecionoj estis filmitaj somere de 1998. Antaŭmenda prezo: € 100. Antaŭmenda prezo por la tuta kompleto de 15 lecionoj: € 240.

**Ĝuu kaj ĝuigu Esperanton kun la familio Bonvolo!**



## KOTIZTABELO DE UEA POR 1999

| Lando/valuto        | MG     | MJ(-T) | MA(-T) | SA     | Kto    | SZ      |
|---------------------|--------|--------|--------|--------|--------|---------|
| Argentino/guldeno   | 8      | 21     | 53     | 32     | 20     | 106     |
| Aŭstralio/dolaro    | 14     | 34     | 85     | 51     | 31     | 170     |
| Aŭstrio/ŝilingo     | 105    | 265    | 660    | 420    | 250    | 1320    |
| Belgio/franko       | 310    | 775    | 1940   | 1235   | 740    | 3880    |
| Brazilo/guldeno     | 8      | 21     | 53     | 32     | 20     | 106     |
| Britio/pundo        | 6      | 16     | 39     | 24     | 15     | 78      |
| Bulgario/guldeno    | 8      | 21     | 53     | 32     | 20     | 106     |
| Ĉeĥio/krono         | 150    | 400    | 1000   | 600    | 350    | 2000    |
| Danio/krono         | 55     | 140    | 355    | 230    | 135    | 710     |
| Finnlando/marko     | 45     | 115    | 285    | 180    | 110    | 570     |
| Francio/franko      | 50     | 125    | 315    | 200    | 120    | 630     |
| Germanio/marko      | 15     | 37     | 93     | 59     | 36     | 186     |
| Greklando/drakmo    | 1700   | 4200   | 10600  | 6800   | 4100   | 21 200  |
| Hispanio/peseto     | 1000   | 2500   | 6250   | 4000   | 2400   | 12 500  |
| Hungario/forinto    | 1100   | 2700   | 6800   | 4100   | 2500   | 13 600  |
| Irlando/pundo       | 6      | 15     | 37     | 23     | 14     | 74      |
| Islando/guldeno     | 17     | 42     | 105    | 63     | 38     | 210     |
| Israelo/guldeno     | 14     | 34     | 86     | 52     | 31     | 172     |
| Italio/liro         | 14 000 | 34 000 | 86 000 | 55 000 | 33 000 | 172 000 |
| Japanio/eno         | 1200   | 2900   | 7300   | 4400   | 2600   | 14 600  |
| Kanado/dolaro       | 13     | 33     | 82     | 49     | 29     | 164     |
| Korea Resp./guldeno | 11     | 28     | 69     | 41     | 25     | 138     |
| Nederlando/guldeno  | 17     | 42     | 105    | 67     | 40     | 210     |
| Norvegio/krono      | 65     | 165    | 415    | 250    | 150    | 830     |
| Nov-Zelando/dolaro  | 16     | 40     | 100    | 60     | 36     | 200     |
| Pollando/guldeno    | 8      | 21     | 53     | 32     | 20     | 106     |
| Portugalia/eskudo   | 1000   | 2600   | 6500   | 4100   | 2500   | 13 000  |
| Rusio/guldeno       | 8      | 21     | 53     | 32     | 20     | 106     |
| Slovakio/krono      | 170    | 420    | 1050   | 630    | 380    | 2100    |
| Sud-Afriko/guldeno  | 15     | 38     | 94     | 56     | 34     | 188     |
| Svedio/krono        | 70     | 170    | 430    | 275    | 165    | 860     |
| Svislando/franko    | 12     | 31     | 78     | 47     | 28     | 156     |
| Usono/dolaro        | 10     | 24     | 60     | 36     | 22     | 120     |
| TARIFO A/eŭro       | 5      | 13     | 32     | 19     | 11     | 64      |
| TARIFO B/eŭro       | 4      | 10     | 24     | 14     | 9      | 48      |

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO



Eŭro, la komuna mono de 11 landoj de Eŭropa Unio (AT, BE, DE, ES, FI, FR, IE, IT, LU, NL, PT) estis enkondukita la 1-an de januaro. Dum la unuaj tri jaroj ĝi estos nur konto-valuto kaj funkcios apud la koncernaj naciaj valutoj. La 1-an de januaro 2002 ekcirkulos eŭraj monbiletoj kaj moneroj, kaj (maksimume) ses monatojn poste la naciaj valutoj malaperos.

1 EUR = 2,20371 NLG.

1 NLG = 0,45378 EUR.

La librotenado de UEA okazas jam en eŭroj. Oni povas daŭre fari pagojn al UEA en guldenoj kaj aliaj konverteblaj valutoj, sed ĉe la librotenado ili estas konvertataj en eŭrojn.

Estas rekomendi ke la uzantoj de la kontoservo de UEA indiku siajn pagojn en eŭroj. Tio ne estas deviga, sed ŝparas laboron al la CO kaj plirapidigas la traktadon de la pagoj. Eldonistoj de libroj kaj gazetoj, organizantoj de E-aranĝoj k.a. estas petataj fiksi la prezojn kaj kotizojn en eŭroj, ankaŭ en ne-eŭraj landoj.

En la ĉi-numera rubriko "Laste aperis" la prezoj de la libroservo de UEA unuafoje estas eŭraj. En la ĉi-apuda kotiztabelo de UEA por 1999 la kotizoj por la eŭrolandoj estas ankoraŭ en la nacia valuto, ĉar la tabelo estis fiksita pasintjare. Tial ankaŭ la kotizoj por aparte menciitaj landoj kun nestabila aŭ nekonvertebla mono estas guldenaj. Tamen, la kotizoj laŭ la malaltaj tarifoj A kaj B estas jam eŭraj.

En la Dua Bulteno de la Berlina UK la prezoj de loĝado, ekskursoj k.a. servoj estas eŭraj. La kongresa kotiztabelo estos fiksita en eŭroj ekde la Tel-Aviva UK.

Iom da konfuzo ne estos evitebla dum la 3-jara transiro, precipe en la komenco, kiam kaj la membroj kaj la stabo de la Centra Oficejo devos alkutimiĝi al la nova valuto. Ni estu atentemaj kaj klopodu lerni rapide!

Centra Oficejo de UEA



# Infandeseгнајoj ligas interkulture


Katalin Smidélus - Hungario

**Interkultura sperto el Szombathely (Hungario) montras kiel daŭra ĉeesto kaj informado esperantista povas alporti imponajn fruktojn.**

Antaŭ unu jaro Katalin Borsos, esperantista studentino de la Pedagogia Altlernejo en Szombathely, ekhavis la ideon analizi infandeseгнајojn el la tuta mondo laŭ psikologia vidpunkto. La temo estis akceptita por ŝia diploma tezo, kaj, post dissendo de alvokoj helpe de Esperanto, kolektiĝis pli ol 500 desegnaĵoj el 14 landoj!

Borsos organizis komence de novembro ekspozicion el la 90 plej interesaj verkoj.

La malfermon (kiu okazis dum la kutima E-klubkunveno) ĉeestis pluraj



"Nia vilaĝo", Diana Thumb von Neuburg, 6-jara.

instruistoj kaj studentoj de la altlernejo, kaj esperantisto Bengt Nord-

löff el Svedio, pro kies ĉeesto estis tute nature interpreti al Esperanto la inaŭgurajn paroladojn. Aparte la nuancoj de avangarda malferm-parolado de artisto, eĉ nacilingve apenaŭ kompreneblaj, defiis la interpretan talenton de studentino Mónika Molnár; tamen ŝi eminente sukcesis.

La katedrestrino esprimis sian deziron havi ankaŭ Esperanton inter la lingvoj de la fako (ĝis nun angla, germana kaj itala), en kiuj oni trejnigas lingvoinstruistojn por la unuaj kvar klasoj de elementaj lernejoj.

Ĉe nia altlernejo pluraj studentoj (bravaj en siaj fakoj) sukcesas enplekti E-on en sian diplom-tezon. Tiel Esperanto fariĝis afero natura, tute ordinara por la studentoj kaj kolegoj de la altlernejo.

Nia artifiko estas: ne rekte propagandi Esperanton, sed uzi ĝin, vivi kaj labori per kaj en ĝi.

## Infanoj pri la milito

Primilitaj infandeseĝnoj videblis de 18 jan. ĝis 10 feb. ĉe la Pariza sidejo de Unesko. Ne temis pri arta ekspozicio, sed pri rezulto de scienca esploro pri rilatoj de infano kun la milito.

Po dudeko da desegnoj por ĉiu milito de la 20-a jarcento... Kio plej forte impresis min? Ruinoj post bombado kun vunditoj kaj flegistoj? Fumtubo de kremaciejo, el kiu eliras fumo en formo de homa kranio? Rompita kolo de pendumito? Homoj brulnuditaj, kun haŭto pendanta, post atombomba eksplodo? Kadavro de virino ŝtoniĝinta, kun kadavro de bebo en la brakoj? Dio, trafita de atombombo en la Paradizo? "Akcepto" de granda amaso da infanoj en ekstermejoj? La frenezaj okuloj de knabino perturbita de bombado, fotita antaŭ tabulo kiun ŝi plenskribis per senordaj spiraloj?

Sur aŝiso staris frazo de Goethe: "Ĉi tie oni amase buĉas ne ŝafojn, nek bovojn, sed homojn: nepenseble!"

Petro Levi - Francio

## AKADEMIO

### Publika konsultejo

Akademio de Esperanto starigis komisionon "Konsultejo de la Akademio", al kiu povas turni sin ĉiu Esperanto-uzanto kun difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la komisiono probable povos respondi relative rapide; ĉe komplikaj gramatikaj problemoj kutime daŭros pli longe. La respondoj ne estos decidoj de Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la konsult-komisiono; tamen la Akademio esperas ke utilos tiu ĉi rapida servo, pri kies manko ofte oni plendis.

Viajn klare formulitajn kaj konkretajn demandojn sendu per ordinara letero, tele-

fakso (nur inter 10.00 kaj 12.00 laŭ mez-eŭropa tempo!) aŭ (plej prefere) retpoŝte al la direktoro de la Konsultejo, Stefan Maul (Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg,

Germanio; ☎+49/821/520-385;

✉maul@newsfactory.net). Ni

ne akceptas demandojn per telefono. Ĉe urĝaj demandoj bv. indiki ĝis kiam vi esperas ricevi respondon. Rapidan respondon tamen ni povas garantii nur al demandintoj kiuj disponas pri ret-adreso aŭ telefakso. La komisiono petas nepre ne sendi bagatelajn

demandojn, kiujn povas respondi ĉiu sperta esperantisto, serĉante en vortaroj kaj aliaj konsult-libroj. Siajn rekomendojn la Konsultejo komunikos ne nur al demandintoj, sed ankaŭ al la E-gazetaro.

Laŭ gazetara komunikado de Stefan Maul





# NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la  
inform-oceano de Tut-Tera  
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj  
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



## FAKA AGADO

Universala Medicina E-Asocio, Esperante kaj angle, sen ligoj: <http://members.aol.com/ferenczymd/umea.html>

## PERSONE

Stefano Kalb invitas al "Kalblando", liverante i.a. komencon de surreta enciklopedio kaj liston de 232 e-istaj hejmpaĝoj: <http://www.panix.com/~kalb/>

## RELIGIO

La ŝonbulisma paĝo donas la tutan tekston de *La sankta Instruo de Ŝonbulismo* (vd. p. 33) kaj ligojn al aliaj religioj: <http://won.wonbuddhism.or.kr/~esperant/>

## RENKONTIĜOJ

83-a Brita Kongreso (2-5 apr.): <http://members.tripod.com/~esperantowales/>  
15-a Printempa Semajno Internacia (3-10 apr.): <http://www.esperanto.de/psi/>  
FREŜO, Pollando (30 jun.-4 jul.): <http://www2.art.olsztyn.pl/fresxo/>  
58-a Hispana Kongreso (17-21 jul.): <http://personal.redestb.es/a-casquero/>  
Internacia E-Konferenco de OSIEK, Francio (17-23 jul.): <http://osiek.org/>  
72-a Kongreso de SAT (24-31 jul.): <http://rafale.worldnet.net/~sat-esp/>  
55-a Internacia Junulara Kongreso (9-16 aŭg.): <http://www.math.bme.hu/~hej/ijk99>

## REVUOJ

*Komentoj*, "la unua ĉiutaga Esperanto-ĵurnalo": <http://www.allsprachendienst.ch/Komentoj/>

*Penseo*, "monata beletra revueto", kun arkivitaj numeroj ekde 1997/1: <http://home.hn.cninfo.net/home/maozf/penseo/index.htm>

## 84-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Berlino, 31 julio-07 aŭg.: <http://www.Esperanto.de/uk99>

La estraro de JEI rezolucii la 24-an de majo 1998 proponi al UEA lanĉon de kampanjo por kolekti subskribojn subtene al la 50-jariĝonta Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj submeti ilin al UN je la datreveno de la dokumento, la 10-an de decembro. Ni jam anticipis decidis organizi la agadon solaj. La "operacon" stiris nia komisiono por Kampanjo 2000. Valorajn konsilojn donis al ni la tiama prezidanto de UEA, prof. LEE Chong-Yeong, kaj la estrarano pri Kampanjo 2000, d-ro Renato Corsetti, kiu kunlaboris ankaŭ en praktikaj aferoj. Subskribaj slipoj estis enmetitaj en kongresajn kovertojn ĉe ĝiĉeto en Montpeliero, zorge de LKK-ano Louis Ensueque.

## Seula seminario

En publika seminario pri "Lingvo kaj homaj rajtoj" (12 dec., Seulo) de Korea E-Asocio kaj Korea Lingvistika Asocio, ĉ. 60 partoprenantoj aŭskultis prelegojn pri la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (d-ro LEE Hang-Nyong, Korea Asocio de Homaj Rajtoj), protekto de naciaj lingvoj (prof. LEE Hyung-Bok, prezidanto de Korea Lingvistika Asocio), lingvaj problemoj de alilandaj laborantoj en Koreio (PARK Chul-Wung) kaj nova internacia lingva ordo (d-ro LEE Chong-Yeong, prezidanto de Korea E-Asocio).

LEE Chongsae - Koreio

do Mattos, Stefan Maul, Sergio Pokrovskij, Roland Rotsaert kaj Ljubomir Trifončovski) povis elekti ĉiu po 1 ĝis 3 personojn. La 15-an de decembro estis anoncita la rezulto de la voĉdonado: William Auld ricevis 6 voĉojn; Renato Corsetti — 4; Ilona Koutny — 2; Harry Harrison kaj Paul Peeraerts po 1. Jen bona komenco por la Jubilea Jaro de la skota poeto William Auld, kiu 75-jariĝos en 1999. Gratulojn!

Laŭ komuniko de Halina Gorecka, sekretario



**ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 1999? SE NE, TIU ĈI ESTAS LA LASTA NUMERO DE NIA REVUO KIUN VI ANKORAŬ RICEVAS!**



## William Auld: Esperantisto de la jaro

La internacia revuo *La Ondo de Esperanto*, eldonata en Ruslando, iniciatis proklamon de la esperantisto de la jaro 1998. La invititaj 8 proponantoj (Marija Belošević, Renato Corsetti, István Ertl, Edmund Grimley Evans, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korĵenkov, Bruno Masala kaj Valentin Melnikov) submetis la nomojn de 17 kandidatoj, el kiuj la 9 elektantoj (Petro Chrdle, Viktor Kudrjavcev, LEE Chong-Yeong, Andy Künzli, Geral-



Unue ni antaŭvidis kiel limdaton la 10-an de decembro, sed ŝovis ĝin al la 14-a de dec., dato de nia malferma tago, kiun ni aranĝis — imite al la CO

— 20 jarojn post la translokiĝo de nia oficejo al ĝia nuna ejo proksime de Universitato Waseda. Antaŭ tio, ni havis la klimakson de nia aktivado por lingvaj rajtoj en la simpozio “La lingvo kiel homa rajto — ideo kaj praktiko de la lingvaj rajtoj” la 24-an de oktobro, en kiu kunvenis 119

personoj (neesperantistoj estis 36).

Finfine, ni povis sendi al la UEA-representanto ĉe UN en Ĝenevo, Andy Künzli, la subskribojn kiuj atingis nin ĝis la 1-a de dec.: entute 1198, inkl. de 726 ekster Japanio. Ili estis prezentitaj al Mary Robinson, Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj, kies supera konsilanto, Dzidek Kedzia, letere peris ŝiajn dankon kaj aprezon la 20-an de jan.

Amnestio Internacia kolektis ses milionojn da subskriboj por la Deklaracio. Ni tamen ne rigardas nian kampanjon fiasko. En la mondo frakasa plimulto ne konscias eĉ pri la ekzisto de lingvaj diskriminacioj. Kiu alia ol esperantistoj atentigus pri ĉi tiuj?

Nia provo kreis novan formon de mondvasta agadmaniero: UEA povas komisi al landa asocio iun mondskalan kampanjon. ★

## TEJO TUTGLOBE EN TORINO

De 25 apr. ĝis 2 majo TEJO seminarioj en Torino (Italio) pri “Lokaj kulturoj en tutgloba mondo.” *Aliĝu antaŭ 15 marto E-parolantoj sub 30 jaroj loĝantaj en Eŭropo.* Iliaj vojaĝkostoj estos 50%-e repagitaj. Partoprenantoj ekster-eŭropaj eventuale ricevos financon kompenson de TEJO; tiucele ili sendu detalan planon pri sia programkontribuo kaj pri la financado de sia vojaĝo. Kontaktu: Lariko Golden, Damjanich u.1/c.l.8, HU-8200 Veszprém, Hungario; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ✉golden@osiris.elte.hu.

## Aplikado

# Kolokva tradicio revekita en Prago

**Kontribue al Kampanjo 2000, Ĉeĥa E-Asocio kun la entrepreno KAVA-PECH aranĝis, aŭspiciate de UEA kaj Internacia Scienca Asocio E-ista, 1-an Kolokvon pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (Prago, 13-15 nov.)**



Josef Kavka

\*Ankoraŭ haveblas la diverstemaj referaĵoj de SAEST 1981 kaj 1982: 155+79p. 29cm. Ilus. Du volumoj. €13,35; resp. 94p. 21cm. Mimeo. €4,35.

Ĉi tiu unua KAEST fakte revekis, post 10-jara interrompo, la tradicion de la seminarioj SAEST (1978-89)\* de Ĉeĥa kaj Slovaka E-Asocioj. Pri ilia historio prelegis, kiel unua, Zdeněk Pluhař.

El la kvardeko da partoprenantoj el 8 landoj, duono prelegis mem. Jen, resume, la temoj:

Petro Chrdle priparolis aŭtorrajtojn el internacia vidpunkto. Miroslav Malovec kaj László Szilvási pledis por komputile arkivi E-beletron resp. fakliteraturon. Rüdiger Sachs rakontis pri afrika krabo-specio, Bojdar Leonov informis pri patento-tekniko, kaj Helmut Rössler prezentis la teoremon de Georg Pick, menciante ke ĉi tiu germana profesoro el Prago, mortigita en la koncentrejo Terezín, estis samaĝulo kaj samganto de Zamenhof.

Malferme al la sekcio “Modernaj rimedoj de komunikado, iliaj avantaĝoj kaj problemoj”, Frank Nitzsche avertis pri sanproblemoj ĉe komputila laboro kaj prezentis prevent-eblojn.

Reinhard Fössmeier koncentris sin al problemoj de aŭtentikeco kaj sekreteco ĉe modernaj komunikiloj. Pri ĉi ties uz-ebloj en instruado prelegis Josef Vojáček, Hans-Dieter Quednau kaj Alicja Lewanderska-Quednau. J. Wozniczka kaj Rainer Kurz prezentis du teknikojn reciprokajn: “paket-radio” interkontaktigas komputilojn per radio, dum Interreto transigas sonon, i.a. de telefonaj konversacioj.

En la sekcio “Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto” Detlev Blanke montris la rolon de planlingvoj en la terminologi-sciencia evoluo de Eugen Wüster. Josef Kavka kaj Hans Michael Maitzen kritikis la natursciencajn resp. specife la astronomiajn terminojn en PIV. Věra Barandovská-Frank prezentis evoluigon de plurlingva terminologio en novaj fakoj interdisciplinaj, kaj Blazio Vaĥa principojn de termino-selektado en planlingvo. Marie Bartovská kaj P. Hauser raportis pri aplikoj de terminologio en

☞ p. 36



# Reagoj



## Rajto je identeco

**M**i deziras kontraŭstari la aserton de la aŭtoro de “Kiajn lingvajn rajtojn?” (dec. '98, p. 206), laŭ kiu la koncepto teritorio estas “grava malsano” de la Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj (Barcelono, 1996). Laŭ tiu linio finfine oni proklamas malsano eĉ la ekziston de popoloj kaj de lingvoj. La plureco de popoloj, de lingvoj kaj de teritorioj ja okazigis kaj povas plu kunkaŭzi gravajn problemojn, kiel kvereloj kaj militoj — sed ilia koncepto kaj realo mem ne estas esence malsano. Mi multe pli konsentus ke la politikaj ŝtatoj estas grava malsano.

Se la aserto de la aŭtoro pravus, ankaŭ la Deklaracio de Homaj Rajtoj suferus gravan malsanon, ĉar ankaŭ en ĝi oni parolas pri teritorioj, ekz. en la Artikolo 2: “Plie, nenia diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio

de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.”



La aŭtoro de la artikolo asertas ke “tremigas” lin la konceptoj “teritoria spaco” kaj “ekvivalenta historieco”, portante al li “la teruran imagon de homaj tragedioj ne tre foraj.” Tiu aludo al naziismo estas alarma. Sed sufiĉas koni la trajektorion de la institucioj kiuj organizis la Barcelo-

nan Konferencon, en kiu estis aprobita la Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj — PEN Internacia kaj CIEMEN (Internacia Centro Escarré por la Etnaj Minoritatoj) —, por dementi ilian ideologian koneksion kun naziismo.

La fakto ke troviĝas nomadaj, diasporaj aŭ alispecaj popoloj (mi tute ne aludas Esperanton!) ne implicas ke ne povas plenrajte ekzisti popoloj kun historia teritorio, urbaro aŭ vilaĝaro. Verŝajne en la Barcelona lingvorajta ĉarto mankas insisto pri la senteritoriaj lingvokolektivoj, sed tio ne senvalorigas la asertojn pri la duaj, precipe tiuj minoritataj. La nuntempa tutmondiĝo de la urboj kaj landoj ne kuntrenu ke la lingvaj kolektivaj identecoj malaperu en Babelegon aŭ en unuforman Kosmopolitismon.

P.S. Mi konscias ke la aŭtoro ne asertas ĉiujn replikatajn dirojn, sed nur aludas ilin, kaj eble temas pri miaflanka misinterpreto.

**Abel Montagut - Katalunio**

Heaney, José Ramos Horta, Adolfo Pérez Esquivel, la verkistoj Ronald Harwood kaj Homero Aridjis, la tenoro José Carreras, Noam Chomsky kaj aliaj elstaraj intelektuloj. Tial la agado de Japana Esperanto-Instituto kolekti subskribojn meritas subtenon anstataŭ nur konstato en la UEA-organo.

**Ljubomir Trifončovski,**  
**Esperanto-delegito en la Asembleo de PEN Club International**

**Red.:** UEA fakte aŭspiciis la subskribo-kolektan kampanjon de JEL, kiun konsile kunpreparis la tiama prezidanto LEE Chong-Yeong kaj la nuna vicprezidanto Renato Corsetti. UEA subtenis la kampanjon i.a. per dissendo de gazetara komuniko kaj de komitata cirkulero pri ĝi, per enmeto de informfolioj en la kongresajn sakojn Montpelierajn kaj per disponigo de senpaga stando tie. Ankaŭ nia revuo informis pri la kampanjo (okt. '98, p. 172, kaj ĉi-numere, p. 28).

## El la poŝtkesto

### Kompromita verda stelo

**E**n la mondo la verda stelo estas simbolo de la E-movado, sed en Pakistano la ministerio pri naskolimigo ekuzis ĝin kiel sian simbolon. Se nun vi elmetas la verdan stelon,



ĉiuj demandas ĉu vi vendas kontraŭ-koncipilojn. Mia frato honorigis min pendigante verdan stelon antaŭ sia librovendejo en Ravalpindio. Nun li jam deziras ĝin forigi, ĉar aĉetantoj petas ĉe li kondomojn kaj kontraŭkoncipilojn.

**Saeed Farani - Pakistano**

### Deklaracio baldaŭ Esperante

**L**aŭ via gloso (dec., p. 207) la Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj troveblas en pluraj lingvoj sed ne en Esperanto. Ĝi estas tradukata kaj aperos en la revuo *Literatura Foiro* kiel eble plej baldaŭ. Por ke la legantoj de *Esperanto* estu objektivaj informitaj pri la Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj, mi aldonas ke ĝin subskribis ankaŭ Esperanta PEN-Centro kaj ke ĝin subtenis persone i.a. la Nobel-premiitoj Nelson Mandela, Simon Peres, Jasir Arafat, la Dalai-lamao, Desmond Tutu, Rigoberta Menchú Tum, Octavio Paz, Wisława Szymborska, Seamus

### Prioritatoj realaj kaj idealaj

**L**aŭ R. Corsetti (jan., p. 2-3) “UEA komencas nun novan kampanjon por disvastigi Esperanton en islamaj landoj kaj tute aparte en arablingvaj landoj”.

Kampanjo por disvastigi Esperanton ja estas bona afero, precipe se ĝi estas bone planita, kaj la nuna ŝajnas tia. Precipe taŭga estas la tria tasko — anoncoj en arablingvaj gazetoj por klera legantaro (instruistoj) kaj poste ekspedo de lernomaterialoj.

Tri problemoj tamen malhelpas la disvastigon de Esperanto en Islamujo:

— arablingvanoj estas minoritato inter la islamanoj



(Indonezio, Irano, Pakistano, Turkio k.a.);

— la judeco de Zamenhof por multaj ortodoksaj muzulmanoj stampas Esperanton “juda inventaĵo” aŭ “armilo de Israelo”;

— nekonsidero de la movada situacio.

La unuaj du baroj estas objekte netransasalteblaj, sed oni ne erarus doni pli da atento al la tria punkto.

Oni ja povas elspezi amason da energio kaj mono por reklami kaj varbi en Sudano kaj Irako, sed en kelkaj el la landoj “islamiĝantaj” Esperanto jam nun havas bonajn tradiciojn, tie funkcias kluboj kaj kursoj; dekoj da aktivuloj kaj E-instruistoj tie ankoraŭ pretas efike uzi eventualajn rimedojn. Unuavice temas pri Bosnio, Uzbekio kaj Azerbajĝano, kiuj ĝis antaŭ ne longe estis parto de respektive Jugoslavio kaj Sovetunio. Duavice, pri la islamaj aŭtonomioj de Ruslando (ekzemple, Baŝkortostano, Dagestano kaj Tatarstano).


Ĉar “ne eblas kontentigi ĉiujn”, oni devas elekti prioritatojn. Konservu niajn homojn aktivaj en tiuj landoj ŝajnas tasko ne malpli grava ol aperiĝi anoncojn en Jordanujo. Ni pripensu kiel ni povas helpi konkretajn samideanojn, kiuj travivas nun krizon pro la konflikto inter sincera simpatio al la islamiĝo de la patrolando kaj inter fidelo al la “kara lingvo”, ĉiam pli malvarme traktata, sed ankoraŭ tolerata.

**Aleksander Korjenkov - Ruslando**

### Kiu islama mondo?!

**K**onsterna estas la artikolo de vicprezidanto Corsetti. Unue: kial islamanoj estu “popoloj kaj triboj”, kaj ne homoj aŭ araboj, irananoj, proksim-orientanoj — samrangaj kiel okcident-eŭropanoj aŭ usonanoj?! La rubriko donas impreson pri postrestinteco kaj elvokas ĝuste la

bildon kiun Corsetti tre (malsukcese) provas kaŝi per sia klarigo pri la amaskomunikiloj, kiuj “ŝatas prezenti nur la islamajn facetojn ligitajn kun maltoleremo”.



Kial ĉiam la “ekstera mondo” (legu: Usono, okcidenta Eŭropo) rilatas kun la t.n. islama mondo difinante ĝin nur pere de islamo? Ĉu s-ro Corsetti (kaj UEA) ne scias ke la “islama” mondo konsistas el plej diversaj landoj, ŝtatoj, regionoj? Islamo ne estas ĉio en islama lando, nek ties kulturo estas nur islama!

Ankaŭ: UEA klarigu al si mem pri kiu regiono ĝi volas okupiĝi. Se per “islama mondo” ĝi celas ĉiujn islamanojn en la mondo, ĝi devus zorgi pri la islamanoj en Turkio, Indonezio, Malajzio ... Eŭropo kaj Usono!

Laŭ mi i.a. Irano kaj Pakistano, ambaŭ ne-arablingvaj landoj, vere meritas pli ol la traktadon kiun ili ricevis en la artikolo. Ili eĉ ne menciigis krom en la fototekstoj! De jardekoj tie la movado estas fortaj kaj viglaj. La senlacaj samideanoj meritas certe laŭdegojn pro sia laboro! Ili povus ion instrui al UEA pri la “islama mondo”. Se UEA vere volas ion fari en la “islama mondo” krom forĵetegi monon, ĝi devus renkonti la lokajn homojn surbaze de lokaj kondiĉoj kaj ne provi trudi “dialogon” kiun ajna homo identigus kiel monologon.

**Abdullah Mossah - Germanio**

### Islamanoj devas studi

**M**i legis la interesan artikolon de R. Corsetti pri Esperanto kaj la islama mondo.

Ni kredas ke lingvo estas scienco. La Sankta Profeto Muhammad (la paco estu super li) estas dirinta:

1. Ĉiuj islamanoj devas lerni kaj studi.

2. Ili devas strebi kaj serĉi sciencan eĉ en Ĉinio. (Antaŭ 1400 jaroj Ĉinio estis tre malproksima.)

3. Ho vi, islamanoj, studu kaj lernu sciencan, eĉ de scienculoj paganaj aŭ hipokritaj.

4. Li ordonis al siaj amikoj kaj kompanoj lerni eĉ la hebrean lingvon.

Do, la Irana Islama Respubliko ne estas kontraŭ la lingvoj. Tial ĝia ministro pri kulturo kaj gvido permesis al mi verki kaj presigi ilustritan persan-Esperantan memlernolibron en 1986.

**D-ro Hejdar Raŝidi - Irano**  
**Fondinto de la E-movado en Afganio**

### Por federacia lingvo

**F**ederico Gobbo (jan., p. 12) okulktrape malhavas konscion pri la fakto ke inventita lingvo, kondiĉe ke ĝi restu nenies hejmlingvo, estas multe malpli lingvovora kaj pli unuforma ol vivanta etna lingvo, kaj ĝi multe malpli emas fariĝi neeleganta kaj nelogika. La ekzemplo — mi plurfoje memorigis — estas la latina lingvo, kiu — ĉesinte esti lingvo parolata de popolo kaj oficiala lingvo de imperio — samtempe ankaŭ ĉesis detruadi aliajn lingvojn kaj mem evolui, morfologie, sintakse kaj semantike.

Analoge, Gobbo ne ŝajnas konscia pri tio ke, se naskiĝos federacia Eŭropo sufiĉe interesata pri sia propra lingva sendependeco por elekti Esperanton, ĝi estos same interesata disvastigi tiun ĉi lingvon en la mondo. Kaj tio estas la kialo — por repreni la ekzem-

plon de Gobbo — ke ankaŭ japana esperantisto devus vidi kun favoro oficialiĝon de Esperanto ĉe la Eŭropa Federacio: li, aŭ kiu ajn alia, ne devus pro tio subteni aŭ aprobi ankaŭ la eksteran politikon eŭropan kaj forlasi siajn poziciojn “neŭtralisman”.


Tria manko de konscio: ne ŝajnas al mi ke Gobbo sufiĉe vidas kiom multe la esperantistaro tute forlasis la universalisman idealon de Zamenhof kaj pli kaj pli konceptas sin mem, en pozitiva senco, ĝuste kiel sektion, kiu plene atingas siajn celojn utiligante Esperanton en sia interno kaj preteratentante la ceteran mondon. (Aparte signifa estas ĉi-rilate la t.n. “Manifesto de Raŭmo”). Ĝuste tiun ĉi pensmanieron oni devas modifi ĉe la esperantistaro, se oni volas doni aleksteran politikon al Esperanto — kiel mi klopodis proponi en la broŝuro kiun Gobbo citas.

Lasta manko: por ke ekzistu tia politiko, la esperantistoj devus agi kiel neregistara organizaĵo — asertas Gobbo. Jes ja, sed kun kiuj celoj? Kun kia kondutlinio? Kun kiaj strategio kaj taktiko? Mi proponis unu tian: ĉar lingvo sukcesas kiel internacia helplingvo ne pro siaj bonaj kvalitoj aŭ celtaŭgeco, sed pro la politika pezo de granda potenco, do ni klopodu — nun kaj ĉi tie — ligi, provizore kaj taktike, la ŝancojn de Esperanto al tiuj de estiĝanta granda potenco, nome unuigita Eŭropo, kiu ĉiukaze bezonos, se ĝi vere fariĝos ŝtato, oficialan federacian lingvon.

Tio ĉi estas mia propono, kompreneble diskutibla. Sed kiu estas la kontraŭpropono de Gobbo, la alia strategio kaj la alia taktiko sugestitaj? Bedaŭrinde ili tute restis en lia plumo. Kvazaŭ sufiĉus ŝanĝi nomon por ŝanĝi naturon.

**Andrea Chiti-Batelli - Italio**





# Recenzoj


## Literaturo

### Plenvoĉe ĝui heksametrojn

**Antologio latina.** Volumo 1: Maturiĝo (ĉ. 250-30 a.Kr.); Volumo 2: Epoko de Aŭgusto (31 a.Kr.-14 p.Kr.). *Kompilis kaj el la latina tradukis Gerrit Berveling.* Chapecó: Fonto, 1998. 576p. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 30. 34,05 eŭroj.

**A**ntaŭ nelonge, kiel kutime, mi ankoraŭ foje devis savi la civilizacion: avertite de miaj spionoj ke la barbaroj, kiuj de post 1968 invadas la instruadan mondon, tiufoje estis decidintaj anstataŭigi ĉe la Episkopa Mezgrada Lernejo la lernadon de l' latina lingvo per tiu de la "informadiko", mi rajdis surloken, prenis la librojn de nun "utilajn por nenio" antaŭ ol la vandalo kiu nun regas super la lerneja biblioteko ĵetos ilin en la rubejon, kaj, kiel kutime, ilin kaŝis en miaj subteraĵoj, atendante la alvenon de iu nova Karolo la Granda.

Inter la savitaj klasikaĵoj mi trovis du porlernejajn antologiojn, kiujn mi utiligis por kompare kontroli *Antologio Latina* de Gerrit Berveling. Mi malkovris ke la elektaĵo de Berveling estas pli bunta, pli interesa ol tiuj de l' ĵus savitaj porlernejaj tekstoj, prudaj, plataj kaj elpurigitaj je ĉiu spico. Oni ne trovos en tiuj lernejoj antologioj, ekzemple, la maldecaĵojn de Katulo aŭ la hororan "fabrikadon de abeloj" de



**Cicerono (106-43 a.Kr.) lasis al ni pli da verkoj ol ajna alia aŭtoro romia.**

Vergilio, kiujn oni trovas, inter aliaj trovindaĵoj, ĉe Berveling.

Li prezentas al la leganto, krom la suprojn de l' latina literaturo, rarajn tekstojn, kiujn oni eĉ ne trovas (almenaŭ, mi ne trovis) ĉe Interreto. En la unua volumo, krom ekstraktoj el aŭtoroj preskaŭ forgesitaj sed rimarkeblaj (ekzemple, la surrealismaj fragmentetoj de Enio), oni legas la "lingvo-normigajn" Ciceronon kaj Cezaron, la Molieran Plaŭton, la spican Katulon, la Volter-ecan Lukrecion Karon. La dua volumo konigas la nov-eracan Vergilion, la cinikan Ovidion, Propercion, Tibulon, kaj ĉiujn kiuj, por gardi siajn laŭrojn surkape, devis flataĉi Aŭguston — kiu, por ne rimarkigi, aŭtobiografiĝe flataĉis sin mem. Ambaŭ volumojn komencas interesaj historiaj enkondukoj.

La tradukisto scienca kaj saĝe "konservis la skemon de la diversaj metrikoj" (p. 15), sed anstataŭigis la longajn kaj mallongajn

vokalojn de l' latina per la Esperanta vortakcento. Tial, por plene ŝati la tradukojn de Berveling, mi konsilas ke oni eniru, kiel Gustave Flaubert en sian *gueloir*, en iun "blekejon", por tie plenvoĉe repi\* la ritmojn de l' latinaj heksametroj: tiel mi malkovris, unuafoje, la ĉarmon de l' klasika metriko. (Antaŭe, ĉar mia gepatra lingvo hispana ne havas longajn kaj mallongajn vokalojn, mi neniam perceptis tiujn ritmojn ĉe la originaloj).

Eble pro tio ke la tradukisto multe atentis la fidelon al la forma etoso de l' poezio, la traduko ŝajnis al mi foje iom tro libera, ĝia Esperanto foje malfacila. Ekzemple, li tradukas *nec semel offensae cedet constantia formae / se certus intrarit dolor* al "kaj l' ofendita fiero por bel' via nepre ne cedos, / ĉar tro realas ĉi doloro" (Epodoj 15,15; p. 339). En la latina, mi komprenis (post obla legado, kaj ne certas ke mi bone komprenis) "kaj [mia] fiero nepre ne cedos al [via] ofend[ant]a belo, [eĉ] se [por mi] estos certa la doloro [kiun tio kaŭzos al mi]". Evidente, Berveling devis elekti inter fidelo al la koncizeco kaj formo de l' versoj, aŭ klareco kaj klarigo de l' frazoj. Li elektis fidelon, kaj, laŭ mi, li bone elektis: unue, ĉar, danke al la akuzativo, por esperantisto la latina frazkonstruo estas malpli fremda ol por parolanto de aliaj modernaj lingvoj; kaj due, ĉar, ankaŭ por la mezuma romiano, la hiperbatoj kaj hipalagoj de liaj poetoj ofte devis esti tiel arkanaj kiel por ni: ĉetable, li eble diris "ili iris solecak sub nokto obskura" prefere ol, kiel Vergilio, "iris obskuraj sub nokt' solecak ili" (*ibant obscuri sola sub nocte*). Por mi estas avantaĝo ke Esperanto malfacila spegulas malfacilon aŭ trokoncizon de l' latina teksto.

La libro entenas tre malmultajn kaj negravajn preserarojn kaj estas presita bone kaj zorge. Oni ne povas diri la samon pri l' bindo: dum legado, la librodorso krakadis, lasante la foliojn iri vivi sian vivon. Mi konsilus al la eldonejo Fonto plibonigi la kvaliton de sia gluo.

Tamen, por literaturo-, historio-, kaj precipe poezio-amantoj, indas revenigi la fuĝemajn foliojn subkovrilen — ili ja estas bone numeritaj — kaj malrapide ilin ŝati kaj ĝui.

**Higinio García - Kebekio, Kanado**

### ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?



Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.

Koresponda Servo Mondskala  
B.P. 6

FR-55000 Longeville-en-Barrois  
Francio

**KSM**

\**repo* = ritma parolado uzata en nuntempa muziko (kp. *Rokmuzika terminaro* de B. Wennergren)



## Grava helpilo premiera

**Klara vortaro Esperanta-araba.** Georgo Abraham (1916). Rotterdam: UEA, 1998. 308p. 24cm. 13,60 eŭroj. Triona rabato ekde tri ekz.

**L**aŭ la antaŭparolo la aŭtoro deziras ke ĉi tiu vortaro (kune kun la araba-Esperanta vortaro, kiu espereble baldaŭ aperos) servu al la loĝantaro de la arabaj landoj, kiu ĝis nun estis sen ampleksa vortaro de la internacia lingvo.

Por tion fari la kompilinto uzis fundamente la vortostokon de la Universala Vortaro de d-ro Zamenhof, sed aldonis al ĝi "modernajn vortojn".

La rezulto estas grandparte laŭdinda, ĉar ĝi ampleksas ĉiujn vortojn konstante uzatajn de moderna esperantisto, sed ankaŭ multajn vortojn ne tiel oftajn, kun iliaj tradukoj en la araban.

La araba estas treege riĉa lingvo, kaj en 300-paĝa libro oni ne povas atendi tion da klarigoj kiom oni trovas en PIV aŭ eĉ PV, sed la aŭtoro estas gratulinda pro la nombro da sinonimoj kiujn li sukcesis enmeti. Tamen, ĉe la multaj faktoroj eble estus bona ideo indiki la diversajn teknikajn signifojn per vinjetoj aŭ mallongigoj.

Kompreneble troviĝas mankoj. Ekzemple apenaŭ sufiĉas klarigi la nomojn de floroj kaj arboj kiuj ne ekzistas nature en la arabaj landoj per esprimoj kiel "speco de arbo", sen pli klara indiko pri kiu temas. Ne sufiĉas klarigi la vor-



Georgo Abraham

ton *setero* per arabaj vortoj kiuj signifas "ĉas-hundo". Estus konsilinde en tiaj okazoj uzi la multajn vortojn kiujn la araba pruntis el aliaj lingvoj en la sfero de ekz. metalurgio, zoologio, anatomio ktp, sed kiujn Abraham esprimas nur per mallongaj

difinoj. Aliflanke li inkluzivigas ne tiel necesajn vortojn, kiel *Levirato*.

Iom stranga elekto regas la loknomojn en la vortaro. *Antverpeno* estas unu el la malmultaj eŭropaj urbonomoj tradukitaj, sed eĉ el la urboj en arabaj landoj troviĝas nur *Alĝero* kaj *Damasko*. Kvankam la nomoj de multaj landoj tra la mondo estas menciitaj, nenie troveblas Libano, Sirio, Irako kaj pluraj aliaj landoj mezorientaj kaj nordafrikaj. Mankas ankaŭ indiko pri la principoj uzataj ekz. rilate al la vortordo en la libro. Kunmetitaj vortoj estas registritaj kvazaŭ ili estus kapvortoj, krom kunmetitaj verboj, kiuj troviĝas sub la verba ĉefelemanto. Utile, tamen, la diversaj partoj de kunmetitaj vortoj (kiel ankaŭ la gramatikaj finaĵoj) estas apartigitaj per oblikva streko, sed bedaŭrinde mankas diferencigo inter oficialaj kaj neoficialaj radikoj.

La kompostado estas ege zorge kaj klare farita, kaj preseraroj estas tre malmultaj. Efektive, post konfesinde supraĵa tralegado, mi rimarkis nur du preserarojn (unu Esperantan kaj unu araban). Mi estas certa, do, ke por komencantoj kaj progresintoj ĉi tiu vortaro estos grava helpilo, almenaŭ ĝis la havigo de PV aŭ PIV. La prezo estas intence kiel eble plej malalta dank' al la helpo de Subvencio Cigno, kaj mi kun plezuro anticipas la eldonon de la lernolibro kaj de la araba-Esperanta vortaro fare de la sama aŭtoro.

Hugh Martin - Britio



## Religio

### Fonto de rara saĝo

**La sankta instruo de ŭonbulismo kaj La fundamenta instruo de ŭonbulismo** (Korea-Esperanta).

El la korea trad. CHOE Taesok. Iksan: ŭonbulismo, 1998. 417 resp. 164p. 19cm. Bind. 16,35 resp. 6,80 eŭroj.

**T**roveblas kelkaj bonaj kialoj por legi librojn filozofiajn: ĝui poeziecan esprimon de universala vero; ekscii pri interesaj pensmanieroj nekutimaj; serĉi kontentigajn respondojn al demandoj tiklaj. Oni anticipas nur malofte trovi veran fonton de saĝo. Jen tia fonto rara. Sotesano (1891-1943), la fondinto de ŭonbulismo,

estas vera saĝulo de nia epoko plejparte sensaĝa. Kaj cetere tiuj ĉi libroj plenumas ankaŭ la aliajn celojn supre listigitajn.

Kompreneble ne ĉiuj legantoj trovos tiujn ĉi librojn tiom saĝoplenaj, sed mi ja kredas ke tiuj kiuj ĝuas grandskalajn sistemojn de moralo bazitajn sur kosmologio, trovos la libron koncernan tute leginda kaj eĉ releginda.

Surface temas pri kombinaĵo de konfuceismo kaj budhismo kun iom da influo de moderna filozofio okcidenta: kompreneble oni atendas tion de manifestaĵo de korea kulturo moderna. Sed la enhavo de *ŭonbulismo* kerne freŝas. Sotesano bazas la tutan filozofion sur bildo de cirklo. Fakte la korea vorto *ilŭonsang* signifas "cirklo". En tiu ĉi kunteksto la cirklo signifas kaj "senĉesa ciklo" kaj "ĉio" kaj "perfekteco". La sistemo ŭonbulisma traktas ne nur rilatojn inter familio kaj socio (Konfuceo);

ne nur metodojn de meditado (Budho); ne nur reciprokajn influojn de spirito kaj materio (Hegel); sed traktas ankaŭ edukadon, memtrejnadon, kosmologion, emociojn ktp. Io por ĉiu!

La libroj brile belas: la presisto eĉ orumis la randon de la folioj. Verdire tiuj ĉi libroj aspektas sankte. Tre forte binditaj, ili travivos longdaŭran uzadon.

CHOE Taesok verkis modelon de tradukarto. Komence li tre lerte spegulas la densan stilon de la formala instruo kiun verkis Sotesano. La dua parto de *Sankta Instruo* montras malsaman stilon, ĉar temas pri rakontoj pri Sotesano kaj citaĵoj el liaj diroj. Do, kompreneble, la stilo tie pli similas normalan konversacion.

*Fundamenta Instruo* konsistas el la unua parto de la tuta *Sankta Instruo* kaj prezentas ĝin dulingve: koree kaj Esperante.

☞ p. 34



## Modernaj nomadoj

**Ili vivis sur la tero.** Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo. *Maryvonne kaj Bruno Robineau. El la franca trad. L. Bourgois, F. Boyet, M. Ternant. Nantes: Opera, 1998. 243+8p. 24cm. 20,40 eŭroj. France: Et leur vie, c'est la terre. Huit ans de nomadisme autour du monde. 1996 (2-a eld.). 277+8p. 20,40 eŭroj.*

**L**a franca bienula knabo Bruno Robineau revis pri vojaĝo ĉirkaŭ la mondon. Pasis tempo, sed ne lia revo. Li persvadis la "trankvilan sekretariinon" Maryvonne ligi sian vivon al la lia, kaj surbiene kaj poste en plenumo de la revo. Estis aŭdaca plano, en aŭgusto 1985, nomadi dum kvar jaroj.

La kvar iĝis ok, dum ili vizitis 30 landojn kaj restadis en 15: Irlando, Israelo (kibuce), Bulgario kaj Hungario (ankoraŭ malvarme militantaj), Hindio, Japanio, Ĉinio, Malajzio, Aŭstralio, Nov-Kaledonio, Nov-Zelando, Tahitio, Gvatemalo, Honduraso, Bolivio. La paro ne konvencie turistis. Ili laŭeble laboris (la bienistaj spertoj ofte montriĝis utilaj), ĉefe ĉe malriĉuloj por ricevi nutradon kaj dormlokon. "Okcidentanoj dezirantaj uzi maĉe-



ton en Malajzio, rikolti lentojn kun hindaj kultivistoj... ĉu vi ŝercas?" (p. 5).

Ankaŭ mi spertis tiun manieron vojaĝi. Oni iras ne kiel reprezentanto, al kiu la lokaj aŭtoritatoj volonte montras siajn kulturajn trezorojn. Nur esceptokaze oni renkontas klerulojn kapablajn ĝisfunde klarigi la historion kaj nuntempajn cirkonstancojn. Oni dependas de propraj, eble tro subjektivaj travivaĵoj, foje oni havas mallarĝan horizonton. Aliflanke

oni ja spertas proprahaŭte, kaj tio tre valoras: jes, la perspektivo estas subjektiva, sed tiaj estas ĉiuj perspektivoj, eĉ "oficialaj". Se superpezas la negatavaĵoj, kiel ofte en tiu ĉi libro, nu, nia mondo ne estas perfekta. Fine de la ok jaroj ges-roj Robineau iĝis gepatroj, ne biologie, sed per adopto de orfo en Bolivio, kio sendube estis la apogeo de ilia deziro esti parto de la mondo spertata.

Laŭ mi la plej valoraj ĉapitroj de ĉi tiu interesa raportaro estas tiuj prezentitaj el la plej humila vidpunkto, ekz. en Hindio, centra Ameriko kaj Bolivio. La belaj koloraj fotoj donas al leganto emon vidi pluajn.

Kroma bonaĵo por ni estas ke en Bulgario la paro lernis E-on. La lingvo helpis ilin survoje, kaj ili estas nun fervoraj adeptoj. Postvojaĝe ili prezentas siajn travivaĵojn per aŭd-vida prelego. Ke tiuj prezentaĵoj bone varbas por E-o, oni facile kredas. Librofine estas alvoko al tradukemuloj. Kontaktadreso: Bruno kaj Maryvonne Robineau, FR-49270 Landemont, Francio; [Bruno.Robineau@wanadoo.fr](mailto:Bruno.Robineau@wanadoo.fr).

**Trevor Steele - Aŭstralio/Litovio**

*Red.: La libro estas jam tradukata, laŭ nia scio, en la anglan (Trevor Steele) kaj rumanan (Ionel Oneț).*

## Pri riĉa vivoverko

**Nikola Aleksiev: Biobibliografio.** *Dimo Martinov. Red. V. Mitev. Sofio: Socio kaj Esperanto, 1998. 39p. 21cm. 2,70 eŭroj.*

**N**ikola Aleksiev apartenas al la plej gravaj figuroj de la postmilita E-movado. Kiel prezidanto de Bulgara E-Asocio kaj de Mondpaca E-Movado, kiel multjara komitatano de UEA (nun Honora Membro), li grave influis ĝin, aparte kaj tre sukcese utiligante la specifajn kondiĉojn en Orienta Eŭropo. Sed li ankaŭ ekster tiu medio estis alte estimata pro honesta kaj efika agado je la bono de Esperanto.

Aleksiev (1909) estas ĵurnalisto, kiu abunde verkis en Esperanto kaj la bulgara. La broŝuro entenas lian biografian skizon kaj verŝajne ne tute kompletan biografion de liaj publikigaĵoj (bulgare kaj Esperante) pri temoj ligitaj al la historio, movado kaj aktivuloj de Esperanto. Ni trovas mension de 16 libroj kaj broŝuroj, diversajn tradukojn al Esperanto el la bulgara (5), el la bulgara kaj angla (1), el la rusa (3), el la franca (2) kaj el Esperanto en la bulgaran (3). Ni krome trovas liajn kontribuojn en 6 antologioj. Li redaktis 3 librojn kaj verkis 309 artikolojn inter 1929 kaj 1997. La bibliografio krome listigas 72 recenzojn pri liaj verkoj kaj 75 artikolojn pri liaj vivo kaj verko. Konvene redaktita materialo pri riĉa vivo kaj verko; modelo por bio(biblio)grafioj pri aliaj movadaj elstaruloj.

**Detlev Blanke - Germanio**

**UK Ĝis la 31-a de jan. al la Berlina UK (31 jul.-7 aŭg. 1999) aliĝis 1830 personoj el 54 landoj.**

## Belega glumarko

**kun la simbolo de nia sekva kongreso, la impona Brandenburga Pordego, aperis jam en la Montpeliera UK kaj furore vendiĝis. Ideala ornamaĵo por viaj leteroj en la monatoj antaŭ Berlino. Mendebli ĉe la Libroservo de UEA: 2,70 eŭroj por folio de 24. Triona rabato ekde 3 folioj.**



**Fonto de rara saĝo (daŭrigo)**

Tial ĝi aparte interesos studentojn de la korea lingvo. Ŝatantoj de abstraktaj traktadoj filozofiaj certe amos tiun ĉi libreton. Kiuj preferas riĉan rakontoplenan prezentaĵon de filozofio, tiuj aĉetu la pli grandan tekston. Kaj ambaŭ librojn evitu tiuj kiuj preferas ne ekzameni la fundamentojn de la homa vivo!

**Miko Sloper - Usono**



# Laste reaperis



**Alti paŝi en Esperanto.** Ionel Oneț (1956). Cluj-Napoca/Berkeley: Dokia/Bero, 1997. 67p. ISBN 973 9074 43 X. 20cm. Rumana-Esperanta vortolisto (ĉ. 5000 vortoj) kaj aliaj materialoj utilaj por rumanolingvaj progresantoj. € 4,55.

**Documente Esperanto. Vol. 1.** Red. Ionel Oneț kaj Sasha Vlad. Cluj-Napoca: Dokia, 1997. 38p. ISBN 973 9074 44 8. 21cm. Rumanlingva. Eta krestomatio de tekstoj pri Esperanto. € 2,60.

**Documente Esperanto. Vol. 2.** 1998. 51p. ISBN 973 9074 53 7. € 2,60.

**Ekzercaro. 2a nivelo.** Julián Hernández Angulo (1953). Havano: Kuba E-Asocio, 1998. 63p. 22cm. Internacie uzbla. € 2,40.

**Ensorĉigita droŝko / Zaczarowana dorożka** (1946). Konstanty Ildefons Gałczyński (1905-53). El la pola trad. Georgo Handzlik. Du lingva: pola-Esperanta. Bialsko-Biała: KLEKS, 1997. 32p. ISBN 83 7194 112 9. 18cm. Ilustris Azat Kuŝyn. Sonĝeca poemo pri nokta Krakovo. € 2,70.

**Jarkolekto Esperanto 1998.** 224p. 27cm. Bind. 23,15 €. Triona rabato ekde tri ekz.

**Konversationsbuch Deutsch-Esperanto / Konversacia libro germana-Esperanta.** Detlev Blanke (1941), Till Dahlenburg (1934). Vieno: IEM, 1998 (2-a, kompletigita eld.). 175p. ISBN 3 901752 13 7. 23cm. Esprimoj prezentitaj laŭ temoj. € 12,00.

**Manuel de Seabra: Liaj multaj patrioj.** Cuadernos de Estudio y Cultura, n-ro 8, marzo 1998. H. Mayer, E. Mayone Dias, B. Losada k.a. Barcelona: Asociación Colegial

de Escritores de Cataluña, 1998. 47p. 27cm. Diverslingvaj (Esperanta, hispana, kataluna, portugala) prelegoj omaĝaj al de Seabra; ĉiu kun Esperanta resumo. € 10,90.

**Memoraĵoj de sinmortiginto.** Yvonne A. Pereira (1906-84). El la portugala trad. Affonso Borges Gallego Soares. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, 1998. 554p. ISBN 85 86984 01 9. 19cm. Transtombaj memoraĵoj de la portugala verkisto Camilo Castelo Branco (1825-1890), diktitaj al medio. € 18,15.

**Noveloj el antikva Ĉinio.** El la ĉina trad. Laŭlum, Liu Caisheng, Hu Guozhu, Shi Chengtai k.a. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1998. 8+554p. ISBN 7 5052 0336 3. 21cm. Bind.

L'Harmattan, 1998. 303p. ISBN 2 7384 6898 5. 22cm. Gramatika lernolibro universitat-nivela por francolingvanoj. € 22,45.

**Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO.** 1999. Rotterdam: TEJO, 1999. 175p. ISBN 83 900118 3 2. 15cm. Mapoj. Kun 945 adresoj el 76 landoj. € 10,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

**Serĉu, kaj vi trovos!** István Nemere (1944). Skövde: Al-fab-et-o, 1999. 71p. ISBN 91 973468 3 X. 21cm. Krimromaneto: la juna detektivino Cora enketas pri la mistera morto de pentristo. € 5,70.

**Sur tranĉando de ponard'.** Nikolai Lozgaĉev (1957-98). Jekaterinburg: Sezonoj, 1998. 24p. 20cm. Poemoj originalaj kaj tradukitaj. € 1,95.


**Timor. La plej granda ekstermejo en la mondo.** Miguel Faria de Bastos (1942). Lisboa: Portugala Esperanto-Asocio, 1998. 67p. ISBN 972 9471 34 7. 24cm. Trilingva: angla, Esperanta, portugala. Kun prefaco de la Nobel-premiito José Ramos Horta. Priskribo de la 22-jara okupacio de Orienta Timoro fare de Indonezio. € 6,80.

**Vivo kaj morto de Wiederborn.** 12 humuraj kaj satiraj noveloj originale verkita en Esperanto. W. Auld, C.

Conterno, Lorjak k.m.a. Jekaterinburg: Sezonoj, 1998. 80p. 20cm. € 4,80.

## KOMPAKTA DISKO

... sed estas ne. Persone: Andreas Grop, Bertilo Wennergren, Martin Wiese. Donnevill: Vinilkosmo, 1998. 28 min. 8 rok-kantoj laŭ "gitarpop-stilo" simila al tiu de la bandoj Police aŭ U2: danciga muziko, poeziaj tekstoj. € 15,00.




**Profesia aspekto pariĝas kun altnivela enhavo, en tri malsamaj ĝenroj.**

Kromkovrilo. 46 verkoj, kiuj estas noveloj plejparte laŭ la tradicia ĉina difino: "notoj pri diversaj onidiroj kaj anekdotoj signifaj por la socio". € 24,50.

**Paneo kaj aliaj noveloj, La.** Serĝo Elgo (1928). Vieno: IEM, 1998. 159p. ISBN 3 901752 14 5. 23cm. Dek du rakontoj de la konata aŭtoro krimromana. € 12,00.

**Parlons Espéranto. La langue internationale.** Jacques Juguin (1933). Paris:



## Laste reaperis

**Festu Tinĉjon 70-jaran!**

De kiam la detektiveto debutis en 1929, vendiĝis milionoj da Tinĉjo-bildstrioj en pli ol 32 lingvoj. La du Esperantajn titolojn oni jam kredis elĉerpitaj, sed nia Libroservo akiris stokon de La nigra insulo; ĝi estas nun ties ĉefa distribuanto.

**La nigra insulo.** Hergé. Trad. Jopetro Danvy. Paris: Esperantix, 1987. 62p. 30cm. € 10,00.

## MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!





**TUTMONDE: Zamenhof-tago**  
Jen kelkaj eroj el la monda aranĝaro dum aŭ ĉirkaŭ la Zamenhof-tago (15 dec.):

- En **Brazilo** (Rio-de-Ĵaneiro) Saulo Wanderley prelegis pri "Zamenhof kaj la esenco de la esismo" kaj deklamis poemon medieme ricevitan. (*Rio Esperantista*)
- En **Finnlando** la societo Pro Esperarto de Börje Eriksson aranĝis en la eta vilaĝo Luhtikylä, por 50-persona publiko, koncerton kun afrika gospelmuzika grupo kaj kun loka horo, kiu kantis tri E-lingvaj kantojn. (B. Eriksson, Ret-Info)
- En **Francio**, en la tradicia trilandna (germana-svisa-franca) Zamenhof-festo en Mulhouse, aperis Zamenhof mem — perso-

nigita de biskvito Eugène Wermelinger, kiu laŭtleĝis la ĉapitron pri E-o el sia freŝa libro *Gēni*. (E. Ludwig, Ret-Info)

• En **Irano**, ĉe Ferdosi-universitato en Mashad (vd. jan., p. 19) multaj studentoj aŭdis prelegon



de d-ro Majzoob Safa, lektoro, kaj vidis ekspozicion de E-materiaĵoj. (K. Sayadpour, Ret-Info)

• En **Italio**, en Triesto, festenan bufedon kronis gastronomia konkurso, kun 9 pladoj prijuĝitaj de 30 gefrandantoj: triumfis farĉitaj daktiloj de Laura

Lukac Sancin. (*TEA-Bulteno*, E. Tantin Ackermann)

• En **Jugoslavio**, en la Serbia Etnografia Muzeo (Beogrado) koncertis, post pri-Esperanta parolado de Zlatoje Martinov, elstaraj kantistinoj de la Beograda Opero. (*InfoSEL*)

• En **Kroatio**, 183 personoj festis la 90-jariĝon de la Zagreba E-movado ĉe la juda komunumo de Zagreb, travivante historiaĵojn prelege, lumbilde kaj filme. La kroata poŝto honoris la jubilean tagon (28 dec.) per speciala stampo. (S. Štimec)

• Simile, en **Pollando**, ronda poŝta stampo salutis, kun pola kaj Esperanta teksto, "90 jarojn de E-movado en Lodzo". (S. Mandrak, Ret-Info)

• En **Svislando**, deko da lokaj e-istoj festis la 30-an datrevenon de Kultura Centro E-ista (La Chaux-de-Fonds) ĉirkaŭ fonduo, post festparolo (Judit Felszeghy) pri "la aktualigo de la Zamenhofa homaranismo tra la Esperanta Civito". (*Ĉe la domparo*)

## AŬSTRALIO: Kresko post UK

Krom Mazi kaj la prezidanto de UEA, pli ol 80 e-istoj el 5 kontinentoj ariĝis en Melburno por 15-a Aŭstralia Somerkursaro (10-23 jan.), eble la plej sukcesa iam ajn. Instruisto Yaw Ampomah Badu Frempong alvenis post koŝmara vojaĝo el Ganao. Atilio Orellana Rojas (surfote, kun Mazi) instruis pri (aŭ per)

horoskopoj kaj hipokampo; Marcel Leereveld alfrontis ne-transitivajn verbojn; Franciska Toubale popoldancis kaj aktoris.

Prelegis i.a. HOÀNG NGOC BÔI el Vjetnamio, aktiva en la preparoj de la Dua Azia Kongreso (22-25 aŭg., Hanojo). Prof. Alan Bishop organizis simpozion, en kiu 12 lingvofakuloj el lokaj universitatoj vidis la funkciadon de Esperanto.

Estas klare — ĉu surprize? — ke la aŭstralia movado supervivis sian Universalan Kongreson... (M. Furness, K. Enderby)

## FRANCIO: Amikeco plantita

La 22-an de novembro la urbestro de Torcy kaj la prezidanto de la loka Esperanta kulturcentro, Jean-Michel Girbes, plantis "arbo de amikeco" kaj subskribis plurlingvan konvencion pri "universalaraĵo—universalalingvo". Adreso por gratuli: M. Fuchet, Maire de Torcy, Hôtel de Ville, FR-71210 Torcy. (J.-M. Girbes)

## Kolokva tradicio... (daŭrigo)

la fakoj brodado resp. metalprilaboro. Fine, Wera Blanke prezentis spertojn, problemojn kaj perspektivojn de Terminologia E-Centro de UEA.

Rond-tabla diskuto konkludis al la neceso eduki e-istojn pri la principoj de terminologia kaj vortarista laboro kaj rekomendis regule daŭrigi KAEST.

M. Malovec kaj P. Chrdle - Ĉeĥio





## HOMRAJTOJ: Lingva dimensio

Unu el la raportoj (eldonitaj ankaŭ libroforme) de la internacia konferenco "Homaj rajtoj en dialogo de kulturoj" (Moskvo, 26-27 nov.), sub egido de Unesko, temis pri "Lingva dimensio de homaj rajtoj". Nikolao Gudskov celis prui en ĝi la nepran neceson de neŭtrala internacia lingvo por reala efektivo de homaj rajtoj. (*La Ondo de Esperanto*)

## INSTRUADO: Ĉe militistoj

De 1998 E-o estas instruata ĉe la Militista Lernejo de Agulhas Negras (ŝtato Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo). La estontaj oficiroj devige lernas tie unu el la lingvoj angla, franca, germana, hebrea, hispana kaj Esperanto. (*Rio Esperantista*)

## LITERATURO: Poezio perata

• La dulingva (E-ĉeĥa) poemaro de Věra Ludíková (*Ekaŭdi la animon*, vd. jan., p. 15) deklame kaj muzike premieris la 19-an de nov. en la Praga PEN-klubo, antaŭ kvindekda ĉeestantoj. Enkonduke prezentis E-on kiel literaturan lingvon UEA-estrarano Petro Chrdle. (P. Chrdle)

• Prepare al sia prelego pri la Esperanta traduko de *Sinjoro Tadeo* en internacia konferenco pri Adam Mickiewicz (Poznań, 3-6 dec.), Zbigniew Galor dissendis re-



Mickiewicz (bareliefo de David d'Angers)

te demandojn pri la kono de la polaj e-istoj. En 12 tagoj venis 105 respondoj el 27 landoj: 80 el la enketitoj sciis ke *Sinjoro Tadeo* estis verkita de Mickiewicz; 63 legis la epopeon, el kiuj 58 en la Esperanta traduko de Grabowski. (Z. Galor)

## ĜUSTIGOJ

Zsuzsa Varga-Haszonits "akiris en decembro hungarian titolon de filologia doktoro" — ni skribis en januaro (p. 18). Temas pri miskompreno: Varga-Haszonits doktoriĝis jam en 1982 per temo interlingvistika — pri kio nia revuo siatempe ja raportis (majo '82, p. 98). Estante jam doktoro (*doctor universitatis*), ŝi akiris en dec. 1997 (ne 1998, kiel sugestis nia artikolo), kadre de restrukturado de la scienca gradaro en Hungario, la pli altan gradon PhD (*philosophiae doctor*), doktoro pri lingvistiko. Gratulon!

Ĉe nia artikolo pri la E-movado en Armenio, sub "Utilaj adresoj" (jan., p. 5), ni indikis ret-adreson ne plu funkciantan. Por kontakti Armenan Esperanto-Asociacion, oni ja povas uzi: □ Bella.Karapetian@wfp.org>.

## DEKLARACIO PRI ETNISTA HUMANISMO



Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) — tutmonda organizaĵo defendanta la rajtojn de la etnaj malplimultoj kaj tiucele uzanta Esperanton — diskutas dum la UK en Berlino deklaron, kiu ilustras la teoriajn fundamentojn de etnismo, insistante ĉefe pri la lingva kaj kultura dimensio de la homaj rajtoj, kaj kiu alvokas ĉiujn al kunlaboro.

1. En la nuna alte tehnologiiginta kaj dense interplektita mondo sufiĉas premo de butono por eksplodigi la planedon, dum la ekologiaj ekvilibroj estas serioze skuataj pro amas-konsumado fare de nur eta parto de la homaro. La nuna mond-ordo estas ekstreme maljusta, ĉar ĝi baziĝas sur ekspluatado de la riĉuloj al la malriĉuloj, de la Nordo al la Sudo, de la homo al la Naturo.

2. Tiu ĉi mond-ordo, krom esti ekstreme maljusta, ankaŭ minacas kaŭzi rapidan finon de la homaj civilizoj kaj supervivo, ĉar ĝia rabado de la Naturo ne plu estas eltenebla kaj ĉar ĝi, emfazante la interesojn de la potencehavaĵoj grupoj, incitas la popolon unu kontraŭ la alia, en lukto por riĉaĵoj pli kaj pli elĉerpiĝantaj kaj en la manoj de malgrandaj elitoj.

3. Tipa kazo de tiu ĉi taktiko estas naciismo, la sanktigo de unu ŝtat-intereso kontraŭ ĉiu alia, kie la ŝtat-intereso estas erare kaj pretekste uzata por kaŝi la volon de ekskluzivaj ekonomiaj kaj potenco-havaĵoj grupoj. La kazo de eksa Jugoslavio, kie ĉiufanke tribecaj argumentoj provis pravigi sangan lukton por kontraŭleĝaj negocoj, estas priluma ekzemplo de tiu taktiko.

4. La nuna sistemo estas tre forta, ĉar ĝi kapablas dividi la homojn per la armiloj de naciismo kaj konsumismo. Tiel la popoloj luktas unu kontraŭ la alia por la sama pseŭdo-bonfarta revo, sekurigante pluan regadon de la ĉiam samaj elitaj intereso.

5. Ni vidas la fortan neceson repensi tiun mond-ordon, kiu influos niajn vivojn morgaŭ, kaj reorganizi ĝin laŭ principoj de individua kaj grupa libereco kaj demokratio. Estas krome nepre bezonate ke la tuta homaro reviziu sian nunan koncepton de Naturo kiel libere ekspluetebla riĉec-fonto.

6. Por fari tion, necesas ĝeneraliĝo de la principoj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu difinas rajtojn validajn "por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato".

7. Tamen tiu principo de individua egaleco ne sufiĉas, ĉar la individuo estas parto de pli vasta loka komunumo, komunumo havanta ligan kun la tero kiun ĝi heredis de siaj antaŭuloj. Post la fino de la epoko de imperiismo kaj koloniado, ekzistas en la mondo distribuo de la popoloj kiun nur paca evoluo, sed neniu milito, "etna purigo" aŭ alia perforto rajtas ŝanĝi. Ni kredas ke ju pli komunumo sentas ligiton al sia tero, des pli forta estos ĝia deziro konservi la ekologiajn kaj kulturajn ekvilibrojn de sia loĝloko. Male, ju pli la homoj estas senpersonigitaj, asimilitaj de fremda sed pli forta kulturo, des pli facile ili fariĝos detruantoj de sia heredaĵo, pro kio la tuta homaro malriĉiĝos kaj nudigos. Ekzistas en la mondo multaj popoloj kies rajto al fizika supervivo estas malrespektata. Ekzistas aliaj popoloj, kies rajto al kultura supervivo estas same malrespektata de ŝtatoj, kiuj timas ke diverseco kaj vera kultura libereco povus endanĝerigi iliajn memkonservajn prioritatojn.

8. Por solvi tiujn problemojn, ni bezonas ne nur individuan, sed ankaŭ grupan principon de libereco kaj demokratio, ĉar, kiel agnoskas la unua artikolo de la Kadra Konvencio por la Protektado de Naciaj [=etnaj] Minoritatoj, aprobita de la Konsilio de Eŭropo la 10an de novembro 1994, "La protekto de naciaj malplimultoj, kaj de la rajtoj kaj liberecoj de individuoj apartenantaj al tiuj malplimultoj, estas integrita parto de la internacia protekto de la homaj rajtoj". La etnaj rajtoj estas do rajtoj homaj. Krome, la rajtoj je puraj akvo, tero kaj aero, venante de la ĉirkaŭa medio, estas ne individuaj, sed kolektivaj, kaj militojn kaŭzas aŭ almenaŭ daŭrigas la fakto ke en la mondo estas fortaj malegalecoj ne nur inter la individuoj, sed ankaŭ inter la popoloj.

9. Sekve, ni alvokas ĉiujn homojn kaj organizaĵojn laborantajn por kultura, lingva, politika, religia kaj alia libereco, al kunlaboro por estigo de nova humanismo, etnista humanismo kiu konsideros la homajn rajtojn laŭ pli kompleta vidpunkto kaj ne neglektos la bazajn aspektojn de grupa kaj loka identeco. Ni estas firme konvinkitaj ke nur tia humanismo kiu celas reciprokan agnoskon de la ekzisto de ĉiuj etnoj kaj, sekve, ilian samrajtigon kaj intertratiĝon por forigi la etnan superstrukturen de la hodiaŭaj konfliktoj, povas ebligi problem-solvon kiu utilu al la homoj, kaj ne al potenco-grupoj.

10. Ni substrekas ke etnista humanismo estas principo kiu, celante pacan reguligon de ĉiuj konfliktoj, firme kontraŭas naciisman ŝovinismon kaj terorismon, sed same kondamnas la miskomprenitan kosmopolitismon, kiu, nome de nur principa egaleco inter la individuoj, celas ilin ĉiujn asimili al la sama modelo kaj ilin fandi en la sama unulingva, unukultura kaj samkonsumanta kaldrono.

11. Estas nia celo ke la homaro reorganiziĝu laŭ pli homaj strukturoj de mem-administro kaj rilatado kun la tero, ĉiam donante al la homaj, kulturaj kaj naturaj flankoj de la vivo la prioritaton kompare kun riĉiĝo, monopolado, ekspluatado de la aliaj. Ni alvokas al ĉies kunlaboro.

Por pliaj informoj, skribu al:

Daniele Vitali, 15a rue de Hespérance, LU-1731 Luksemburgo; □ikel@bigfoot.com.



## TUTMONDECA RIGARDO

Andrew O. Urevbu

### Kulturo kaj teknologio



Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio. Kiel efikas kulturo sur teknologian evoluon? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologian ŝanĝon? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.

"Helpas akiri pli tutmondecan rigardon al la rolo de kulturo en teknologia evoluo."  
(Ulrich Lins)

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.



**CHERPILLOD: Skribĉampiono**

André Cherpillod (68-jara), aka-demiano, aŭtoro de Esperantaj kaj francaj libroj apenaŭ nom-



André  
Cherpillod

breblaj, atingis la unuan lokon en la kategorio "profesiuloj" de la ortografia ĉampionado televida *Les dicos d'or* ("La oraj vortaroj"), kiun amasoj spektis en tuta Francio la 16-an de januaro. Li eraris eĉ ne unufoje, nek ĉe la demandoj de ĝenerala klereco nek en la diktaĵo mem. Sekvaj intervjuoj kun Cherpillod en diversaj gazetoj menciis lian E-aktivadon pozitive, kiel inspirfonton por profunde studi la gepatran lingvon francan. (A. Cherpillod, A. Fran-geul, *Espéranto Ile-de-France*)

**HILĈISIN: La gitaro de Maja**  
Maja Hilĉisin (17-jara) el Sara-jevo unue vizitis Katalunion en somero 1996, kiam Esperanta Centro de Sabadell invitis dek- kvinon da bosniaj infanoj (vd. dec. '96, p. 216). Maja gastis ĉe

la geedza paro Josep Mateu kaj Pura Rufas, kun simil-aĝa filino Nŭria. Ĉiuj kvar lernis E-on antaŭ- vide al ĉi tiu renkonto. La muzik-ema Maja, kies gitar-studojn la milito interrompis, jam tiam revis ekstudi ĉe konservatorio en

Katalunio. Kaj la revo realiĝis: post jaro kaj duono da demar- ŝoj, ekde la pasinta aŭgusto Maja loĝas ĉe la familio Mateu- Rufas kaj studas gitarludadon ĉe la konservatorio de Sabadell. (*El butletŭ de l'Esperanto*)

**JERMAN: 25 JAROJ DA E-TEATRO**

**Kvincento da gastoj ĝuis teatraĵon kaj solenan bankedon la 21-an de dec. en la prestiĝa Zagreba teatro Kerempuh: Vida Jerman festis 25 jarojn da laborado por la Esperanta teatro. Post enkonduko de Dalibor Brozoviĉ kaj Spomenka Ŝtimec (prezidanto resp. sekretario de Kroata E-Ligo), Nikola Raŝiĉ transdonis gratulvortojn de Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA. Kroata Asocio de Dram-artistoj donis al Vida Jerman honor-ordenon, kies engravurita teksto emfazas ŝiajn meritojn por Esperanto. Jerman ludis *La rompita virino* de S. de Beauvoir, premi-erintan en la Montpeliera UK. La jubileo estis rimarkita de la gazetoj *Veĉernji List*, *Glo-bus* kaj *Jutarnji List*, de tri televidaj kaj de du radiaj elsendoj. (S. Ŝtimec)**



Vida Jerman  
kaj ŝia duonmilopa  
publiko jubilea



Josep Ĉizme

**Oficiala informilo****NOVJORKA OFICEJO DE UEA**

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Aŭstralio: Teresa M. Metherall.

**PATRONOJ DE TEJO 1999**

Belgio: José A. Pinto de Sousa. Britio: Martyn Hugh McClelland; Neil MacKilligin. Finnlando: Allan Mehtonen; Anna Ritamäki; Albin Backholm. Francio: Michel Cavelan; Bérengère Cheverry; Claude Longue-Épée; Denis-Serge Clopeau; P. Freslon; Gustave Blary; Henriette Cortes; Jean Dalet; Jean-François Clet; Maurice Feneyrol; Odile Masseron; Philippe Berizzi; Pierre Cheynet; Paulette Naulet; Raymond Despujols; Richard Cash; Renée Triolle; Yvette Nicaise-Pierre. Germanio: August Franke; Florin Caragea; Franz Knöferl; Franziska Reisel. Italio: Lidia Neri Lami; Gianfranco Polerani. Japanio: Hidetada Ito;

Zyun'iti Sibayama; Utako Kobayasi; SIMADA Sunao. Nederlando: Louise Adelaar.

**SOCIETO ZAMENHOF 1999**

Aŭstralio: Nassif Isaac; Teresa M. Metherall. Belgio: José A. Pinto de Sousa; Karel Van Steenberg. Britio: E.E. Mallett; Sybil V. Sly; Adrian Vincent-Jones; John C. Wells. Danio: Ejnar Hjorth. Finnlando: Anna-Liisa Heikkinen; Terttu Tyynelä; Veikko Tikkanen. Francio: Jean Amoureux; André Loisel; Blaise Berthonneau; Claude Longue-Épée; Denise M.H. Loisel; Henriette Cortes; Hélène Gauduchau; Jeannine Croze; Jean-Paul Beau; Louis Ensuque; Louise Marin; Maurice Feneyrol; Odette Bernet; Julien Ducrocq; Marc Savre. Germanio: August Franke; Eva Bork; Heinz Schindler; Helmut Welger; Helmut Klünder; Werner Bormann; Werner Heinrich. Italio: Lidia Neri Lami. Japanio: Mituo Gotou; Ken'iti Matumoto; Kyōhei Nakazima; Nobuo Sakurai; Saburō Yamazoe; Kōiti Simizu; SIMADA Sunao; SATOO Ŝooiĉi; Takeo

Sugano; Yosikazu Takeuti; YAMASAKI Seikō. Luksemburgio: Brian R. Moon; Claude Nourmont. Nederlando: Joaquim Calado; Louise Adelaar; Joop W. Moonen; Yfke Weidema. Portugallio: João A. Frazão de Faria. Svedio: Martin Häggström; Harald Andersson; Lennart Svensson; Nils G. Johansson. Svislando: David Cohen; S. Kaufmann. Usono: Humphrey Tonkin; Jane Edwards; Lucille C. Harmon; William R. Harmon.

**DONACOJ 1998 (NLG)**

ĝis la 31-a de decembro

**Asocia Kapitalo**: Sumo ĉi-jara: 397 531,20.

**Fondaĵo Afriko**: Britio: A. Vincent-Jones 31,20. Nederlando: R. Moerbeek 50,00. Svedio: J. Hammarberg 46,12. Sumo tutjara 26 454,62.

**Fondaĵo Ameriko**: Germanio: F. Reisel 200,00. Sumo tutjara 5156,50.

**Fondaĵo Azio**: Japanio: H. Abe 65,00; M. Aihara 49,43; Y. Akada 325,00; J. Brozovsky 33,10; K. Deguti 82,75; H. Egawa 32,50; Esperanto-Den-



**STUDENTO 30-JARA** pri matematiko kaj fiziko volas korespondi kun samfakuloj. EDAH G. Gaston, B.P. 613, IMSP, Porto-Novo, Benino.

**SONJA MARINA BRANDENBURG** naskiĝis la 6-an de januaro 1999 sana kaj gaja. Pri tio ĝojas la gepatroj Judith Brandenburg kaj Willi Müller, la geavoj Margret kaj Willi, la geonkloj Ulrich kaj Barbara, Guido kaj Martina, la gekuzoj Jens, Heike, Anne! Adreso: Judith Brandenburg, Grindelallee 145a, DE-20146 Hamburg (Germ.).

**SE VI VOJAĜOS AL NIGERIO** por la tutmonda junulara futbal-evento *Nigeria '99*, la movadanoj ĉe la Universitato de Ibadan helpas al vi mendi lokon en proksima hotelo (nun dultila ĉambro kostas 80 USD). Kontakto s-ron E. O. Oladipo, p/a Mr. O. Oluwo, ☎+234/2/241-42-84.

**9-AN INTERNACIAN ESPERANT-KURSKUNVENON** okazigos Seula Esperanto-Kulturcentro kaj E-Propaganda Asocio de Oomoto: 24-26 aprilo 1999, Seulo, Koreio. Turnu vin al ☐esperant@unitel.co.kr aŭ <http://www.esperanto.co.kr>.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas neman rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



# ANONCETOJ

**FLEGISTO 40-JARA** en togolanda vilaĝo volas korespondi tutmonde kun kuracistoj kaj flegistoj. Kossi Logossou, Anyronkopé, B.P. 276, Aného, Togo.

**NOVA ADRESO DE JORGE CAMACHO** ekde marto 1999: Chantada 43, 1-J, ES-28035 Madrid, Hispanujo, tel. +34-913737495.

**LIGE AL LA MONDA HORTIKULTURA FORUMO '99** (Kunming, provinco Yunnan, 1 majo - 31 okt.), Ĉina Radio Internacia (Esperanto-sekcio, CN-100040 Beijing; ☐cri@box.cri.com.cn) okazigas ses-demandan konkurson ĝis la fino de aprilo. Aŭskultu trifojn en marto la elsendon "Vojaĝo en Ĉinio". Ĉiu partoprenanto ricevos premion aŭ memoraĵon.

**MEMORAĴOJ DE SINMORTIGINTO.** Romano de fama verkisto portugala, kiu suferis en la transmondo dum longa tempo kaj post sia pento trovis en la astrala mondo Akademion de Esperanto. Li verkis la libron per la mediumino Yvonne A. Pereira, tradukitan de s-ano Affonso Soares. Bela kovrilo, bonega teksto, 554-paĝa, prezo 40 guldenoj. Eldonis Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo. Mendebla ĉe UEA.

**PEDIATRO KLINIKA**, nefrologia specialisto (ne transplantoj) el Kubo serĉas profesiajn kontaktojn mondscale. Komencanto, preferas unuan kontakton hispane aŭ angle: d-ro Eduardo Arias Fonseca; ☐brossard@his.scu.sld.cu.

**SENDU GRATULOJN** al la urbestro de Saint-Pompain (M. le Maire, FR-79160 Saint-Pompain, Francio), kiu la 29-an de majo inaŭguros Placon de Esperanto. Pliaj informoj: Georges Menossi, rue des Monfortains, FR-79160 Saint-Pompain.

**ODESA DOMO DE SCIENCISTOJ** pretas organizi decembre de 1999 internacian sciencon konferencon en la rusa, ukraina kaj E-o, dediĉe al la 140-jariĝo de Zamenhof kaj (nerondcifera) datreveno de Eroŝenko. Bonvenas sciencaj prelegoj lige al la E-lingvo kaj -movado, Zamenhof, Eroŝenko, aliaj E-verkistoj kaj agantoj. Aliĝpetojn kaj demandojn al Tatjana Auderskaja, Odessa; ☐solo@uran.intes.odessa.ua.

**KUN JUNULINOJ** korespondus pri aerobiko kaj pri ĉio kio estas bela: Eduardas Čepas, Kauno 23-38, LT-4430 Jurbarkas, Litovio.

**PRI "NOVA ERAO"** (angle *new age*) estas preparata reta informejo kun glosaro en Esperanto. Serĉas fakterminologojn, interesojn kaj kunlaborantojn Herman Deceuninck, Kluisstraat 22, BE-1500 Halle, Belgio; ☐herman.deceuninck@vlaanderen.be.

syusyo Sue 32,95; K. Hayasi 32,95; K. Hirose 32,95; Y. Hori 32,95; A. Hosida 32,95; H. Hukamoto 66,20; T. Huzita 65,14; H. le 33,10; M. Isino 65,91; M. Itabasi 32,95; T. Itou 52,73; Y. Izumi 32,50; K. Kakehi 65,91; M. Kinoshita 33,10; S. Kitagawa 65,91; T. Kobayasi 32,95; U. Kobayasi 32,95; T. Konisi 32,50; M. Kubota 32,95; T. Maekawa 66,20; Y. Miwa 32,95; I. Miyamoto 32,95; S. Miyamoto 32,95; S. Nagai 66,20; S. Nagura 97,50; T. Nisi 65,91; Y. Nisimura 32,50; H. Obara 32,95; H. Okuda 32,50; S. Okutu 82,39; H. Onda 65,91; Oomoto Esperanto Hukukai 164,76; T. Ootaki 33,10; Y. Sasaki 32,95; W. Schmid 32,95; T. Sugano 32,50; T. Sugihara 32,50; K. Syōzi 165,50; M. Tahira 66,20; Y. Takeuti 65,91; M. Tamura 34,93; S. Tezuka 32,95; T. Unoki 40,20; S. Yamasaki 32,95; S. Yamazoe 65,00. Korea Resp.: LEE C.-Y. 33,10. *Sumo tutjara* 12 679,25.

**Biblioteka Fondaĵo:** Nederlando: R. Moerbeek 100,00; R. Vetter 45,00. *Sumo tutjara* 145,00.

**Fondaĵo Canuto:** Francio: S. Amariglio 33,60;

M. Andriot 16,80; J.J. Aumeunier 67,20; H. Cortes 33,60; J. Croze 67,20; J. Ducrocq 336,00; L. Ensuque 460,32; A. Frangeul 33,60; R. Hardy 6,72; L. Marin 67,20; M. Massemmin 43,68; O. Masseron 33,60; A. Salamito 26,88. Hispanio: M. de Seabra 60,00. Nederlando: D. Krombeen 50,00; R. Moerbeek 100,00. Nov-Zelando: D. Dewar 95,00. Svislando: E. Walder 52,06. Usono: G. Harabagiu 59,60. *Sumo tutjara* 11 360,96.

**Konto Espero:** Nederlando: D. Krombeen 50,00; R. Moerbeek 100,00. *Sumo tutjara* 1498,57.

**Fondaĵo Grabowski:** *Sumo tutjara* 842,93.

**Junulara Fondaĵo:** Francio: L. Vignaud 40,00. Nederlando: J. Bosse-Sibbel 45,00; G. Peet 50,00. *Sumo tutjara* 2550, 57.

**Fondaĵo Oficeja Ilaro:** *Sumo tutjara* 450,00.

**Renovigo de la Domo:** *Sumo tutjara* 4500,00.

**Triamonda Kongresa Fondaĵo:** Germanio: F. Reisel 277,00. Nederlando: N.C. Kuiterman-van Goor 100,00. Svedio: R. Moln 25,00. *Sumo tutjara* 3138,75.

**Volontula Fondaĵo:** aŭkcio Montpeliero 4528,80. Brazilo: R. Lemos 60,00. Britio: A. Vincent-Jones 15,60. Francio: S. Amariglio 33,60; H. Cortes 33,60; J. Ducrocq 168,00; L. Ensuque 336,00; R. Hardy 6,72; F. Lauriol 33,60; L. Marin 67,20. Nederlando: R. Moerbeek 100,00. *Sumo tutjara* 7973,17.

**Kampanjo 2000:** Belgio: E. Ernst 25,00. Finnlando: V. Tikkanen 25,00. Francio: A. Albault 25,00; R. Boré 25,00; J. Gibaux: 25,00; H. Roy 50,00. Germanio: M. Gründler 30,00; J. Winter 50,00. Hispanio: L. Parada de Palacios 25,00. P. Juliá 25,00. Japanio: K. Kikusima 25,00. Nederlando: C. kaj R. Bossong 50,00; R. Moerbeek 100,00. *Sumo tutjara* 47 106,55. **Ĝenerala Kaso:** Brazilo: C. Lemos 85,00. Britio: L. Mee 17,32. Nederlando: P.A. Buijsters 18,00; L.A. Demmendaal 220,00; J. Pranger 8,00; Rotterdam E-Societo Merkurio 500,00. Svislando: D. Bühlmann 68,50; G. Eggenberger 10,11; M. Jaccard 5,48; E. Jayet 5,48; F. Liechti 10,96. *Sumo tutjara* 9653,81.

*Al ĉiuj tre koran dankon! UEA*



**Euclides CARNEIRO DA SILVA** (1919-1998), verkisto, filologo, universitata profesoro, forpasis la 24-an de majo en Mogi das Cruzes (ŝtato San-Paŭlo, Brazilo). Lerninte Esperanton en 1947 de la brazila pioniro Ismael Gomes Braga, li servis multjare kiel delegito loka kaj pri lingvistiko. En la 80-aj jaroj li kunfondis Brazilan E-istan Katolikan Organizon kaj kelkajn jarojn redaktis ties revueton *Brazila Katoliko*. En brazilaj E-kongresoj li ofte prelegis kaj helpis pri ekzamenoj.

**Metodi IVANOV DIMITROV** (1921-1998), prezidinto de la E-societo Radio en Pazarĝik (Bulgario), mortis la 9-an de oktobro.

**J. SEMMELINK**, aliĝinta al UEA en 1938, dumviva membro, iama fakdelegito pri kristanismo, forpasis la 28-an de oktobro en Pretorio (Sud-Afriko).

**Tonnerre Adjéoda TENGUE** (1960-1998), kasisto de la togolanda E-klubo Nova Stelo, mortis la 18-an de septembro.

**DAI Songen** (1944-1999), komitatano kaj ĉefdelegito de UEA ekde 1985, sekretario de Komisiono pri la Azia E-Movado, ĝenerala sekretario de Ĉina E-Ligo, vicĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio*, forpasis en Pekino pro kormalsano la 16-an de januaro, kelkajn tagojn post sia 55-a naskiĝtago.

Lerninte Esperanton en Ŝanhajo en 1964, li fariĝis preskaŭ tuj profesia esperantisto, unue kiel parolisto de la Esperantaj elsendoj de Radio Pekino



Arkivo de UEA

**Tyburcjusz TYBLEWSKI** (1933-1998) mortis la 1-an de decembro en Jelenia Góra (Pollando). Senatano de AIS kaj dekanato de ties morfoscienca sekcio, membro de Internacia Scienca Asocio E-ista, li verkis beletrikaj fake, i.a. rakontarojn (*El la valo*, 1981; *Fihonestulo* 1983), studojn (*Skizo pri personeco de e-isto*, 1985; *Psikosocia problemaro de internacia turismo*, 1988; *Atendoj rilate Eŭropon post komunismo*, 1993) kaj multajn artikolojn en *Scienca Revuo*, *Monato* ktp. Li tradukis el la pola, i.a. *Formoj de vizaĝo* de T. Rózewicz (1987) kaj antologion de infanaj verkoj (*La peto persisti*, 1996). Li plurfoje prelegvojaĝis en Francio kaj prelegis en Internacia Kongresa Universitato (Montpeliero, 1998). UEA-membro ekde 1956, li servis tri jardekojn kiel delegito pri instruado kaj turismo.



Arkivo de UEA

(1966-81), kaj sekve en diversaj postenoj ĉe Ĉina E-Ligo. Unu jaron (1982-83) li laboris ankaŭ ĉe la Centra Oficejo en Roterdamo. Perfekta organizanto kaj modesta homo, kiel sekretario de la LKK li ŝarĝis sin per grandega parto el la okazigaj taskoj de la 71-a, Pekina UK (1986) — arango pionira en Ĉinio, kiu tiam ankoraŭ malhavis sperton pri gastigo

de tiel grandaj internaciaj kongresoj. La ĉina kaj la tutmonda E-movado tro frue perdis elstaran gvidanton.

**Henri VATRÉ** (1908-1998) forpasis en la Zamenhofa tago, la 15-an de decembro, en Le Lignon apud Ĝenevo.

Laborinte en 1933-1934 du jarojn en Budapeŝto ĉe la eldonejo Literatura Mondo, li debutis poezie ĉe la samnoma revuo en 1935 kaj en kolekto redaktita de Kalocsay, *Naŭ poetoj* (1938). Inter 1959 kaj 1962 liaj recenzoj, poemoj kaj rememoroj aperadis en *La Nica Literatura Revuo*; eĉ novelo, *La kimra biblio* (kiun Kalocsay tradukis en la hungaran). Por Stafeto li kuntradukis (1958) *La floroj de l' malbono* de Baudelaire kaj verkis, pseŭdonime kiel Henri Baupierre, la pastĉaron *Specimene* (1962), kies stilparodioj pri kvardeko (!) da E-verkistoj pruvis la jaman maturecon de literaturo kun tiom da distingeble propraj voĉoj.

Liaj postaj verkoj aperis plejparte ĉe Iltis, i.a. *Neologisma glosaro* (4 eldonoj ekde 1983), tradukoj el la romanoj *Nokta flugo* (1983) kaj *Tero de la homoj* (1985) de Saint-Exupéry, *Vort-statistikaj esploroj* (1986) kaj la poemaro *Disaj gutoj* (1989). Por UEA li redaktis kun Reto Rossetti duvoluman antologiegon de la Esperanta novelarto, *Trezoro* (1989).

Kun karakteriza modesto, Vatré akceptis presprovaĵe legi kaj prikonsili multajn E-eldonaĵojn, de Stafeto kaj aliaj. Li i.a. indeksis la aŭtoritatan konsultverkon *Esperanto en perspektivo* (1974) kaj publikigis diversloke zorgajn vort-statistikajn esplorojn tra la verkoj de dekoj da E-aŭtoroj. Ĉion ĉi li skrupule plenumadis malgraŭ pli kaj pli regresa vidpovo. Laŭ omaĝa frazo de Régulo, Henri Vatré “ade mallumigis siajn okulojn por heligi la Esperantan literaturon al nunaj kaj venontaj generacioj.”



Arkivo de UEA

## Estraro de UEA

**Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo):** S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ✉ kependery@bigpond.com.

**Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo):** d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ corsetti@itelcad.it.

**Ĝenerala Sekretario:** s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ✉ lipari@esperanto.nu.

**Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado):** d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice,

Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ✉ chrdle@telecom.cz.

**Estrarano (Afrika agado):** s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17.

**Estrarano (informado):** s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ✉ Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.



# Jen la plej

vaste legata junulara gazeto  
rekomendinda por komencantoj  
bela kaj moderna  
diversa kaj amuza  
interesa por ĉiuj

**KIATKO** estas gazeto  
por ĉiu kiu serĉas interesan  
legajon en Esperanto. Ĉiu  
numero havas ankaŭ tekstojn  
en tre facila lingvo, tiel ke  
**KIATKO** estas aparte taŭga  
por komencantoj kaj por  
Esperanto-kursoj. Krome,  
konkurso atendas vin en  
ĉiu numero de la revuo!  
En 1999 **KIATKO** aperos  
6-foje. Abonu rekte de UEA  
aŭ ĉe via kotizperanto.



## ABONTARIFO 1999

|           |              |          |              |             |              |
|-----------|--------------|----------|--------------|-------------|--------------|
| Aŭstralio | 31 dolaroj   | Francio  | 120 frankoj  | Nederlando  | 40 guldenoj  |
| Aŭstrio   | 250 ŝilingoj | Germanio | 36 markoj    | Norvegio    | 150 kronoj   |
| Belgio    | 740 frankoj  | Hispanio | 2400 pesetoj | Pollando    | 20 guldenoj  |
| Brazilo   | 20 guldenoj  | Israelo  | 31 guldenoj  | Portugallio | 2500 eskudoj |
| Britio    | 15 pundoj    | Italio   | 33000 liroj  | Svedio      | 165 kronoj   |
| Danio     | 135 kronoj   | Japanio  | 2600 enoj    | Svislando   | 28 frankoj   |
| Finnlando | 110 markoj   | Kanado   | 29 dolaroj   | Usono       | 22 dolaroj   |

**Granda rabato por grupaj abonoj  
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

## NOVA REVUO Esperantologio / Esperanto Studies estas planata.

Altkvalitaj manuskriptoj pri ĉiuj aspektoj de Esperanto estas  
serĉataj por ĝia unua kajero, kiu espereble aperos en 1999.  
Por pliaj informoj rigardu [www.math.uu.se/esperanto](http://www.math.uu.se/esperanto) aŭ skribu  
al Christer Kiselman: <kiselman@math.uu.se> aŭ  
Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio.

## Fondaĵo Canuto

**Multaj arde deziras membriĝi  
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via  
donaco al Fondaĵo Canuto helpas  
nin teni la kontaktojn kun tiuj,  
kiuj suferas pro transpagaj baroj.  
Antaŭdankon pro via solidareco!**

## Pionira vortaro por mondlingvo



**KLARA VORTARO ESPERANTA-ARABA.**  
**George Abraham. Rotterdam: UEA, 1998.**  
**308p. ISBN 92 9017 056 5. 22cm. Prezo:**  
**30,00 gld.**

*"Grava helpilo por komencantoj kaj progresintoj."  
(Hugh Martin)*

La araba estis la sola oficiala lingvo de UN kiu ĝis nun malhavis  
ampleksan Esperanto-vortaron. Jen la unua paŝo por forigi  
tiun mankon.

*Klara vortaro Esperanta-araba rezultas el pli ol 30-jara pionira  
laboro. Ĝi estas klara, ĉar ĝiaj 15000 kapvortoj estas plejparte  
aranĝitaj laŭ la alfabeto ordo de la vortoj anstataŭ tiu de la  
radikoj.*

# VASTAS LA MONDO, MULTAS LABORO

**Kim Woo-Choong**  
Fondinto kaj prezidanto de Daewoo



Libro kiu "inspiras al junuloj revon kaj esperon" kaj  
helpas kompreni la mensan fonon de la ekonomia  
sukceso de la "aziaj tigroj".

La aŭtoro estas fondinto de la Daewoo-grupo, unu el  
la plej grandaj entreprenoj en la mondo. Daewoo  
subvenciis la Esperanto-eldonon, kiu estas vendata  
favore al Kampanjo 2000.

*Vastas la mondo, multas laboro.* Kim Woo-Choong.  
Trad. Choe Taesok. Seulo: Shin Cheon Ji, 1998.  
219p. ISBN 89 85005 16 2. Prezo: 8,15 eŭroj.

# Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and  
Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.  
La rolo de planado  
en la homa komunikado.  
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktas: Probal Daŝgupto,  
Marc van Oostendorp, Humphrey Tonkin.  
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,  
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.  
Individua abono: 41,75 eŭroj  
Institucia abono: 88,50 eŭroj  
Abonu pere de la Libroservo de UEA.





## LA RADIKOJ DE EVOLUO

Mervyn Claxton

### Kulturo kaj evoluo



La kulturo de ĉiu popolo estas intime ligita al ĝia evoluo. Lastatempe tiu ligo rompiĝis, precipe en evolulandoj, pro adopto de la okcidenta evolumodelo kaj internaciigo de la okcidenta evolumodelo. La aŭtoro de tiu ĉi Unesko-studo – klerulo kaj eksdiplomato el Trinidado kaj Tobago – tamen montras kiel ankaŭ nun eblas utiligi la tradiciojn de la popolo por ĝia evoluo.

*“Evoluo povas prosperi nur se ĝi havas radikojn en la kulturo kaj tradicio de la koncerna lando.” (p. 15)*

**KULTURO KAJ EVOLUO.** Mervyn Claxton. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1998. 60p. ISBN 92 9017 059 X. 21cm. Prezo: 6,80 eŭroj.



### Sepa Internacia Turisma Semajno En Malto

de la 4-a ĝis la 10-a de septembro 1999

Prospektoj kaj aligiloj haveblaj ĉe:

Malta Esperanto-Societo,

P.O. Box 142, Valletta CMR 01, MALTA

maltaesp@global.net.mt

### Tri imponaj volumoj grandrabate!

EDISTUDIO decidis malaltigi la prezojn de multaj siaj libroj. Aparte okulfrapas la novaj prezoj de: Ŝekspiro, **La sonetoj** (trad. W. Auld, dulingva eldono, 326p), 45,00 12,00 eŭroj; W. Auld, **En barko senpilota** (plena poezia verkaro, 874p), 36,75 21,00 eŭroj; **Aŭstralia antologio**, 34,00 21,00 eŭroj.

## Trinku ankaŭ vi el la akvoj de nia Fonto

Unu el la plej riĉaj libro-katalogoj estas tiu de Fonto.

Pli ol 80 libroj, originalaj aŭ tradukitaj, bone, bele kaj kompetente eldonitaj, plus 18 jarkolektoj de la monata beletra revuo FONTO.

Prestigaj verkoj kiel Rikolto, La Luzidoj, Sed nur fragmento, Cent jaroj da soleco, Antologio Latina... kaj la furorantaj verkoj Lasu min paroli plu, Ili kaptis Elzan, Gerda malaperis, Vere aŭ fantazie, de Claude Piron, kaj multaj aliaj, troviĝas en tiu katalogo, senpage livebla de



### Brazila Esperanto-Ligo

Ekskluziva distribuanto de Fonto

Caixa Postal 03625

70084-970 Brasília-DF

Brazilo

Fakso: 55 061 226 4446

Telefonnumero: 55 061 226 1248

bel@esperanto.org.br

Specialaj kondiĉoj por  
libroservoj kaj  
ceteraj revendistoj

Por senpage ricevi la katalogon, bonvolu sendi vian poŝtan aŭ retadreson.

# GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

## HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ.

Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad.

Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA,

1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm.

Prezo: 10,90 eŭroj.

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la homrajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.

## HOMAJ RAJTOJ

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

de Leah Levin

Ilustrita de Plantu



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO